

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aleksiev 90-jara



**Kvar projektoj
esperigaj**



**Kalendaro
ĝis 2000**



**La subteno
de Einstein**



Papo: Medalo pro toleremo

Vi trovos...

121 *Malferme*

Ni transpaŝu la lingvajn barojn

Kalle Kniivilä

122 "NI TRANSPAŜU LA SOJLON DE L' ESPERO"

Roman Dobrzyński



124 *Jubilee*

Idealoj donas fortan puŝon

(intervjuo kun Nikola Aleksiev)

125 *Solidareco*

Agado Espero kreskigas projektojn

Renato Corsetti

126 *Forumo*

Strangaj voĉoj el Interreto

Flavio Cimonari Rebello

**TRIA LANDA KONGRESO,
DU JAROJN ANTAŬ UK**

Spomenka Štimec

Historio

La subteno de Einstein

127 *Konferencoj*

Scienco UK-is en Budapeŝto

Nitobe en Berlino

Hans Erasmus

128 Notu bone

Navige tra TTT-paĝoj

129 Reagoj

130 KALENDARO 1999-2000

132 Recenzoj

Jorge Camacho pri

La paneo kaj aliaj noveloj kaj Promeso en obskuro

Sten Johansson pri

Tien

Hajnal kaj Stefan MacGill pri

La knabo frenezeta kaj Flicts

István Ertl pri

Hungara-Esperanta meza vortaro.

Magyar-Eszperantó kézikönyv

Håkan Lundberg pri

Vivo kaj morto de Wiederboren

135 Laste aperis

Kaj plue...

136 Influe

137 Fake

138 Loke

139 Foliume

140 Forpasoj – Oficiala informilo

La kovrilo: Papa beno.
(Apostola nuncio, Hago)

Dekstra paĝo: Ĉaro en
Mijanmaro (antaŭe Birmo).
(M. Vermaas)

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establitita kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66;
USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); infor-
miĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2100, 1/2 p. 1150,
1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja
ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo:
Pasquale Zepelli.



NI TRANSPAŜU LA LINGVAJN BAROJN

Esperantistojn ne disigas la landlimoj. Tamen ni mem ofte volas disiĝi de la malagrable neesperantista mondo, amuziĝi en niaj propraj rondoj kaj plendi pri la eksteruloj, kiuj ne komprenas nin, kiuj ignoras nin, aŭ ofte eĉ dubas pri nia ekzisto — sed samtempe ni forgesas ke oni atentis pri ni nur se ni faras ion atentindan, kaj faras tion ne sekrete, sed publike.

Jam ne nova, sed ĉiam pli efika maniero fari ion tutmonde rimarkeblan estas uzi Interreton. Paradoxse, tamen, ĝuste pro sia enorma disvastiĝo la reto iĝas ĉiam malpli tutmonda, pli regiona. La retoj ne plu sencele drivas de unu kontinento al alia sur la elektronika oceano, sed rapide navigas al horaro de la lokaj busoj. Kaj kompreneble ne plu superregas la reton informoj produktataj en la anglalingvaj landoj: daŭre plifortiĝas la pozicio de la malpli grandaj lingvoj kaj kulturoj.

Efektive nur nun, kiam la enhavo de la reto laŭ sia diverseco komencas almenaŭ iom simili al la reala mondo, oni povas nomi la reton tutmonda en la vera signifo de la vorto. Sed samtempe la nova evoluo starigis ankaŭ en la elektronika kontinento la samajn limojn kiuj nin ĝenas en la malvirtuala mondo.

Limojn emas restarigi ankaŭ la esperantistoj. Kiel preskaŭ ĉie en la mondo, ankaŭ en la nova kontinento de Interreto aktivis esperantistoj. Sed same kiel ĉie, ni ankaŭ en la reto pli volonte ĝuas la agrablan etoson de


Esperantujo ol kontaktas kun la “malamikaj” eksteruloj. Tamen ĝuste en la reto devus esti aparte facile transpaŝi la limojn kaj egalece kontakti kun la ekstera mondo. Sed por tio necesas ke ni ĉesu lingve diskriminacii la homojn kiuj eble samopinias kun ni, sed ne scias nian lingvon.

Ja abundas retaj informoj pri Esperanto, sed gravas ke Esperanto ankaŭ estu vere uzata kaj videbla en la reto egalrajte kun aliaj lingvoj, kaj ke eksteruloj povu ekscii kion efektive faras la E-movado, sen ia misiado — ĉar eĉ tiuj kiuj eble simpatias kun niaj ideoj kaj agado, povas esti forpeltitaj de mallerta propagando.

Bone videbligas Esperanton ekzemple la diversaj retserĉiloj kiuj jam uzeblas ankaŭ per esperantlingva interfaco, aŭ la elstara kaj jam tre prestiĝa servo de Sveda Esperanto-Federacio, kiu amasigas ligojn al centoj da diverslandaj amaskomunikiloj.

Kiel malbona ekzemplo povus aliflanke servi nia propra asocio, kiu ĝis nun nur minimume ĉeestas en la reto, kaj kies tre utilaj retroŝtaj gazetaraj komunikoj estas disvastigataj nur inter esperantistoj. La paĝoj de UEA ĉe www.uea.org tamen iom post iom evoluas, kaj la retaj gazetaraj komunikoj de la asocio baldaŭ atingos pli vastan publikon, krom Esperanto unue en la angla. Ankaŭ ni transpaŝas la lingvajn barojn.

Kalle Kniivilä



Dum sia vizito al Pollando, la 10-an de junio la papo Johano Paŭlo la 2-a

ricevis Medalon de Toleremo.

Enmanigis la medalon al la papo d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof, en akompano de prof. Hanna Konopka, prezidantino de Fondumo Zamenhof en Bjalistoko. La Medalo de Toleremo estis aljuĝita al la papo la 14-an de aprilo fare de kapitulo, kiun krom la reprezentantoj de la Fondumo konsistigas elstaraj personoj de la Bjalistoka socio, i.a. ĉefepiskopo Stanisław Szymecki.

Komplezo de Roman Dobryński

Bjalistoko malfermas ekspozicion, gardas lernejon

La 82-a datreveno de la morto de L. L. Zamenhof estis celebrata en lia naskiĝurbo Bjalistoko ne nur per rutina flormetado al lia monumento — omaĝo dum kiu lia nepo, d-ro L. C. Zaleski-Zamenhof, estis akompanata de urbaj kaj vojevodiaj aŭtoritatoj.

En la sama tago estis inaŭgurita la ekspozicio "Bjalistokano L. L. Zamenhof kaj lia verko", en ĉiuj montrosalonoj de la Bjalistoka Historia Muzeo. Ĉi ties bela modernisma domo situas ĉe strato Warszawska 37, preskaŭ vidalvide al la lernejo kiun la juna Ludoviko vizitis ĝis 1873. La ekspozicion preparis profesia stabo de la muzeo, sub gvido de Jolanta Rogowska kaj arta prizorgo de s-ano Chomczyk, loka plastikisto, esperantisto. Pasante de salono al salono, oni spektas panoramon de la naskiĝurbo de Zamenhof, konatiĝas kun la genezo de la lingvo internacia, ĝia historio kaj aktuala stato. Bele eldonita katalogo helpas krozi tra la maro de ekspoziciaĵoj, kies konsiderindan parton liveris la CO de UEA. Unu salono iĝis kuracista kabineto de la Zamenhofa epoko.

La ekspozicio daŭris ĝis la fino de majo, kaj nun de loko flugas ĝi al loko, celante ĉefe lernejojn. Je la inaŭguro oni anoncis konkurson por lernejoj pri la temo de la ekspozicio. La tutan aranĝon iniciatis Fondumo Zamenhof, sed ĉiujn kostojn kovris la muzeo.

L. C. Zaleski-Zamenhof montras la Medalon de Toleremo.



Komplezo de Roman Dobryński



"Ni transpaŝo sojlon de l' e

La malfermo de la ekspozicio fariĝis la ĉefa evento de tiu tago en Bjalistoko. Ĝi altiris la kompletan de la urbaj kaj vojevodiaj aŭtoritatoj, escepte de urbestro R. Tur, forestanta pro alia devo. Porokazan paroladon faris vicurbestro K. Teodoruk.

Demando kiu en la pasintaj monatoj cirkulis en Esperantujo, ricevis trankviligan respondon. Laŭ klarigo de vicurbestro M. Kozłowski, la lernejo Zamenhof certe ne malaperos el Bjalistoko (vd. marto, p. 57). La publika Zamenhof-lernejo ja fariĝos privata

edukejo de la katolika eklezio, sed — laŭ konfirmo de ĉefepiskopo Szymecki al Zaleski-Zamenhof kaj Konopka — "ekzistas neniu motivoj por forpreni de la katolika lernejo la nomon de Ludoviko Zamenhof." Ĉi tiun deklaron disvastigis la lokaj amaskomunikiloj. **RD**



Roman Dobrzyński - Pollando

u la
spero"

La ideo pri la medalo fruktis el multjara konversacio kun d-ro Zaleski-Zamenhof, sur kies bazo mi verkas biografian libron pri li. Ĝia pola versio baldaŭ estos preta. La personaj vivspertoj de mia kunparolanto igis lin konsideri la toleremon fundamenta valoro de la interhomaj rilatoj. Fondumo Zamenhof en Bjalistoko, same pro la patrono kiel pro la loko, ŝajnis kompetenta organo por lanĉi la Medalon de Toleremo.

Efektive, dank' al impetaj klopodoj de prof. Konopka, kiu de du jaroj estras la Fondumon Zamenhof, la ideo trovis ĝeneralan apogon en Bjalistoko. La lokaj instancoj ne avaris monrimedojn por tiu nobla celo. La taskon doni artan formon al ĝi ricevis bulgara artisto vivanta en Bjalistoko, Dimitar Grozdev. Kapflanke de la medalo videblas planto inter du manoj kaj la vorto "toleremo" en Esperanto kaj la pola. Dorsflanke troviĝas portreto de Zamenhof kaj bildo de Palaco Branicki, perlo de la baroko, nomata ofte "Versajlo de Podlahio" (la regiono kies ĉefa urbo estas Bjalistoko).

D-ro Zaleski-Zamenhof difinas la toleremon kiel respekton al iu ajn alieco, i. a. nacia, kultura, lingva, seksa, religia. Ĉion ĉi entenas ankaŭ esperantismo laŭ la koncepto de Ludoviko Zamenhof.

Gliwice: Altrangaj vizitoj

La 17-an de junio la papo vizitis ankaŭ la urbon Gliwice, kie troviĝas la estrara sidejo de Pola E-Asocio. Por saluti lin, esperantistoj venis al la loka sporta flughaveno kun granda surskribo, preparita el verda ŝtono kun blankaj literoj kaj nia stelo: "Dio estas amo" (la slogano de ĉi tiu papa pilgrimo). Kaj en la pola: "Esperantistoj bonvenigas la papon". Ili atendis du fojojn, ĉar pro malsano la papo povis alflugi nur du tagojn post la planita dato – sed eĉ tiam, malgraŭ la prokrasto, salutis lin duon-miliono da homoj, inter ili grupo de esperantistoj el Supra Silezio. En vesperaj raportoj televidaj (pola programo 1, satelita Polonia) tiu grupo estis videbla kelkajn sekundojn.

Tri tagojn poste gastis en Gliwice ankaŭ la pola ĉefministro, prof. Jerzy Buzek, por ricevi la honorigan statueton Glivicius, ĉiujare aljuĝatan al homo kiu plej multe kontribuis al la reputacio de Gliwice. Al la transdona ceremonio estis invitita ankaŭ la prezidanto de Pola E-Asocio, Stanisław Mandrak. Nome de la pola esperantistaro li gratulis la ĉefministron kaj kelkvorte informis lin pri la E-movado en Pollando. Fakte, lastatempe PEA sendis kelkajn paĝojn pri la situacio de la E-movado al la ĉefministra sekretariejo, laŭ ties peto. La peto estis ligita kun la rezolucio de mez-eŭropaj E-asocioj (vd. apr., p. 77), kiun PEA sendis al kelkaj gravuloj de la lando.

Stanisław Mandrak - Pollando

Kial la papo?

Kial la unua distingito estas la papo? Laŭ d-ro Zaleski-Zamenhof, dum la pontifikado de Johano Paŭlo la 2-a la katolika eklezio iĝis pli tolerema ol iam ajn, kion konfirmas liaj ekumenismaj streboj kaj nova rilato al aliaj religioj, same kiel lia forta kondamno de rasismo kaj antisemitismo. Krome Johano Paŭlo la 2-a estas la sola ŝtatestro en la mondo kiu publike uzas Esperanton, dum la ĉiujaraj benoj je Kristnasko kaj Pasko. Li ankaŭ aprobis liturgiajn tekstojn en Esperanto.

La ideo honorigi Johanon Paŭlon la 2-an per la unua Medalo de Toleremo ne estis publike diskutata, ĉar necesis, unue, akiri la konsenton de la papo akcepti ĝin kaj, due, fiksi daton kaj manieron de la enmanigo. Finfine venis la informo ke la papo pretas akcepti la medalon dum la ekumena diservo en Drohiczyn, grava historia urbo en Podlahio.

Efektive, la enmanigo de la Medalo de Toleremo al la papo okazis la 10-an de junio. La solenaĵo estis televide elsendita por tuta Pollando. Oni povis tre klare vidi d-ron Zaleski-Zamenhof (meze sur la bildo), dum li alparolis la papon kune kun prof. Konopka (plej dekstre).

Rimarkinda simpatio

Reveninte al Varsovio, d-ro Zaleski-Zamenhof raportis: "Mi diris al Johano Paŭlo la 2-a ke mi estis kortuŝita kiam li kaj la altranguloj de diversaj eklezioj ripetis konkorde ke la homoj estas filoj de la sama Dio. Similaj vortoj kronas la poemon de mia avo 'Preĝo sub la verda standardo'. Ili sonas en Esperanto jene: 'Kristanoj, hebreoj kaj



Idealoj donas fortan puŝon

La 29-an de junio 90-jariĝis Nikola Aleksiev, Honora Membro de UEA. Mariana Petrova intervjuis lin.

■ Ĉu vi estas de longe esperantisto?

Mi naskiĝis kiel la lasta, oka infano de analfabetaj, ege malriĉaj gepatroj, en la urbo Berkovica. Helpe de miaj fratoj, mi sukcesis fini gimnazion kaj fariĝi studento pri agronomio. Esperanton mi lernis jam 15-jara, aŭtodidakte el la fama lernolibro de Atanas D. Atanasov (ADA). La ideo esperantista entuziasmis kaj daŭre obsedas min — pli ol 75 jarojn.



Aleksiev (dekstre) kun Hideo Yagi, UEA-prezidanto 1962-64.

■ Kiel vi povis konservi vian korean aktivadon tiel longe?

Tre juna mi ekkonis progresemajn ideojn kaj idealojn. Ankaŭ la esperantismo estas tre nobla ideo pro siaj demokratieco kaj internacieco. La batalo por interkompre-

niĝo de la popoloj, por paca vivo sen militoj forte altiris min. Mi travivis kvar militojn (du mondajn), revolucion, kontraŭrevolucion. Mi sincere akceptis la Zamenhofajn ideojn pri paco en granda "rondo familia". Tiaj ideoj kaj idealoj donas fortan puŝon

al la mensa kaj eĉ fizika aktiveco de ĉiu sincera pacamanto. Kvankam mia persona vivo estis tre kruda kaj pena, la idealismo subtenis min eĉ en plej tragikaj momentoj.

■ Ĉu Esperanto utilis al vi en via multflanka agado?

Mi aplikis miajn Esperantajn konojn en ĉiuj sferoj de agado: partia, sindikata, junulara, porpaca, ĵurnalista, abstinencula, turista ktp. Miaj klopodoj donis bonajn fruktojn: multaj konatiĝis kun la praktika utilo de Esperanto kaj iĝis niaj simpatiantoj aŭ samlingvanoj.

■ Via organiza kaj gvida laboro arkas jam tra sep jardekoj.

Jes: jam en 1930 oni elektis min gvidanto de

Bulgara Laborista E-Asocio, de 1964 ĝis 1976 mi estis prezidanto de Bulgara E-Asocio, kaj 15 jarojn mi prezidis Mondpacan E-Movadon. Komitatano de UEA mi elektiĝis en 1964, kaj en 1980 mi estis proklamita Honora Membro, certe pro mia LKK-prezidanteco de du UK-oj (Sofio, 1963; Varna, 1978) kaj pro mia helpo organizi du kongresojn de TEJO. Mi kontribuis al la du fervojistaj mondkongresoj okazintaj en Bulgario, al tri ĝeneralaj konferencoj de MEM, kaj al multaj aliaj renkontiĝoj, simpozioj, laborbrigadoj ktp. Krome, mi plenumis funkciojn en la gvidorganoj de la bulgara kaj la monda pacokonsilioj, vojaĝis en kvar kontinentoj kaj partoprenis multajn kongresojn en preskaŭ ĉiuj mondopartoj. ★

De kaj pri Aleksiev

Apostolo de libereco. *Portreto de Vasil Levski.* Mercia MacDermott. El la angla trad. N. Aleksiev. 1980. 359p. € 7,90.

Georgo Dimitrov. Pri E-movado kaj pacbatalo. 1982. 38+9p. € 1,35.

Historio de la E-movado. 1992. 71p. € 2,70.

Kvindek jarojn. Bulgara Laborista E-Asocio. 1980. 39p. € 0,70.

Per Esperanto - por aŭtentika informado. *Eseoj, recenzoj, reagoj.* 1998. 122p. € 13,60.

Pioniroj kaj veteranoj de MEM. *Skizoj kaj memoroj.* 1983. 68p. € 3,40.

Mia vivo. Trifon Ĥristovski. Trad. el la bulgara N. Aleksiev. 1981. 179p. € 3,55.

Nikola Aleksiev: Biobibliografio. Dimo Martinov. Red. V. Mitev. 1998. 39p. € 2,70.

Survoje al Internacio de Proleta E-istaro. Adolf Schwarz. Red. N. Aleksiev. 1992. 223p. € 9,90.

☞ mahometanoj / Ni ĉiuj de Di' estas filoj.' Ĝuste el tiuj ĉi vortoj naskiĝis la ideo de Medalo de Toleremo, kiun mi havas la honoron enmanigi al Via Sankteco nome de Fondumo Zamenhof kaj de la instancoj podlahiaj kaj Bjalistokaj, pro via nobla kontribuo al ekumenismaj celoj, kiuj estis tre proksimaj al la koro de la kreinto de E-o. Ekumenismo signifas toleremon por aliaj religioj. La toleremo en pli vasta senco estas respekto al alieco filozofia, etna, lingva kaj alia.' La papo aŭskultis miajn vortojn kun rimarkinda simpatio. 'Ho, Esperanto, Esperanto! — li reagis laŭtvoĉe. — Ni kuraĝu transpaŝi la sojlon de l' espero!''* ».

Jam antaŭ ĉi tiu enmanigo la lokaj instancoj rekonis la Medalon de Toleremo kiel celtrafan iniciaton. La Bjalistoka socio akceptis ĝin kiel sian: tio aŭguras ne nur pli vastan, sed ankaŭ pli pozitivan rilaton de multaj personoj al Esperanto. La sukcesa enmanigo de la medalo al la papo atribuas al ĝi jam ĉe la komenco altrangan valoron. Kiu sekvos post la papo? Jen la demando kiu jam nun ekscitas la bjalistokanojn. ★

*Red.: Transpaŝi la sojlon de l' espero estas titolo de libro de Johano Paŭlo la 2-a, el 1994.

Agado Espero kreskigas projektojn

Renato Corsetti

Konto Espero jam sep jarojn apogas esperantistajn militviktimojn tra la mondo. Novaj iniciatoj spontanaj ebligas nun novajn manierojn helpi.

Unu el la kritikoj al Konto Espero rilatis al ĝia limiĝo al “esperantistaj” viktimoj. Eble prave, sed la negrandaj rimedoj de la Konto altrudis prioritatojn. Aliflanke, tamen, nun spontane elkreskas novaj iniciatoj, kiuj permesas al ni transpaŝi tiujn limojn — iniciatoj kiujn ni provas apogi per Agado Espero.

Projekto 1 · Stud-stipendio

Usonaj esperantistoj pretas starigi ŝparkonton, en kiu post kelkaj jaroj estu sumo de kelkiloj da dolaroj, uzeblaj de juna albano el Kosovo por siaj (antaŭ)universitataj studoj. La grupo serĉas kosovan infanon (de ĉ. 12-15 jaroj) suferintan pro la milito, kiu preferu parolu mem Esperanton aŭ apartenu al E-lingva familio. Oni donos prioritaton al infano kiu perdis gepatro(j)n. Por pluaj informoj aŭ por indiki pri taŭga kandidato, bv. kontakti: Ionel Oneț ĉe E-Ligo por Norda Ameriko, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530 Usono; ionel@esperanto-usa.org.

Projekto 2 · Mil familiaj pakaĵoj

Malgraŭ la nuna eventuala eksolvo de la Kosova krizo, homa katastrofo plu minacas centmilojn da rifuĝintoj. Ili — kaj la parencoj aŭ konatoj kiuj ilin akceptis — bezonegas helpon: plej urĝe nutraĵojn, higienaĵojn, vestojn, ŝuojn, porinfanajn necesajojn. La projekto celas helpi 1000 rifuĝintajn familiojn aĉetante por ili po 1 pakaĵon konsistantan el faruno (5 kg), rizo (3 kg), sukero (5 kg), oleo (5 l), laktopulvoro (1 kg), salo (1 kg), spicoj (0,5 kg), dentopasto (2), vitaminoj (1 pako), lavpulvoro (3 kg) kaj sapo (1 kg). La distribuado estas organizata laŭ nomlistoj kompilitaj en komunumoj kaj en centroj por rifuĝintoj. La suma kosto de 1 pakaĵo estas 50 germanaj markoj. La agado estas prizorgata de

Malgraŭ la nuna eventuala eksolvo de la Kosova krizo, homa katastrofo plu minacas centmilojn da rifuĝintoj.



Humanitara Organizo Espero M. Spahe, 10/II 71000 Sarajevo, Bosnujo kaj Hercegovino; ☎ +387/71/441-842; ☎ 441-843.

Ili serĉas helpon de esperantistoj ĉefe por ke tiuj traduku informojn pri la projekto al sia nacia lingvo kaj kontakti naciajn help-asociojn. Por monhelpoj la plej facila vojo estas sendo al UEA, nepre kun la indiko “Konto Espero — Projekto 2”.

Projekto 3 · Gastigado en Francujo

Grupo de francaj esperantistoj (tra

Amikeca Reto) peras kontaktojn en Francujo por gastigi rifuĝintojn el Balkano. Amikeca Reto havas postulojn: la gastigantoj devas esti en serioza kontakto kun la Esperanto-grupoj

(kaj la urbodomoj), por kiel eble plej bone akcepti tiujn homojn kiuj vivis dramajn momentojn. Ĉiuj informoj pri supozataj movoj de esperantistoj al iu landlimo ege interesas la francajn esperantistojn por rilati kun savasocioj (Ruĝa Kruco ktp) kaj por serĉi ilin. Ĉiujn informojn kaj informpetojn bv. sendi, kun la indiko “Projekto 3”, al Renato Corsetti, kiu ilin peros.

Projekto 4 · Ĝemeloj en eks-Jugoslavio

La Esperanto-grupo en Ulm (Germanujo) intencas helpi en la kreado de interurbaj aŭ interklubaj rilatoj inter esperantistoj en Jugoslavio kaj en aliaj landoj. La grupo pretas kunordigi la petojn de E-klubo kiuj deziras ĝemelojn en Jugoslavio kaj helpi trovi tiujn partnerojn. La grupo ankaŭ havas helpkonton, kiun ĝi uzas nur por rekta kaj urĝa helpo, ekz. por aĉeti medikamentojn. Gerald Grupp, motoro de la agado (Pfülerstr. 26, DE-89231 Neu-Ulm; Gerald.Grupp@bn-ulm.de; UEA-konto: “scrm-x”) deklaras ke ili kompreneble ne distingas laŭ etnoj, kaj ke se pere de e-istoj ili ekscios pri urĝa helpobezono de neesperantistoj, ankaŭ tiujn ili klopodos helpi.

Pri ĉiu ajn el la iniciatoj eblas plu informiĝi ĉe Renato Corsetti (adreso en la kolofono). ★

Strangaj voĉoj el Interreto

Antaŭ ne longe mi akiris komputilon. Navigante tra Interreto, mi kontente malkovris novan kontinenton, kun faŭno tre abunda kaj amuza: Esperanton! Mi konatiĝis kun homoj kaj vidpunktoj plej diversaj. Sed mi ankaŭ trovis kelkajn danĝerojn en tiu landaro virtuala. Rande

kohereco povas esti nomata ankaŭ "tradicio": post pli ol cent jaroj da uzado, nia lingvo ja prezentas propran personecon, distinge de aliaj planlingvoj, daŭre kabinetaj. Tiun tradicion konstruis la gigantoj de nia literaturo: Zamenhof, Kalocsay, Auld, Waringhien, Lapenna kaj multaj aliaj.

Forumo



de logiko kaj kutimo, oni ekuzadis kelkajn formojn ne tute kongruajn kun nia kutima uzado de Esperanto.

Estas nek la unua nek la lasta fojo ke oni proponas "plibonigojn" en la kara lingvo, ĉu leksikajn ĉu gramatikajn. Sed ĉi-foje la problemo atingas novan nivelon. Pro la disvastiga rapideco de Interreto, "neologismon" lanĉitan antaŭ semajno hodiaŭ uzas jam dekoj da esperantistoj, ne ĉiam konsciaj pri la vera lingvo-struktura amplekso de la proponataj ŝanĝoj.

Mi jam trovis ĉe Interreto monstraĵojn kiel *olim*, *mejbi* kaj *neksta*. Temas klare pri konscia misuzo, ĉar la koncernajn paĝojn kreis ne komencantoj aŭ krokodiloj, sed personoj kiuj kredas tiujn formojn pli akcepteblaj ol la tradicie uzataj.

La internacia lingvo venkis gravajn krizojn dum siaj pli ol cent jaroj. La minacoj preskaŭ ĉiam venis de homoj kiuj parte aŭ tute ne komprenis la spiriton de nia lingvo. Mi ne aludas ian mitan "internan ideon", sed simple la fakton ke E-o superas siajn problemojn precipe dank' al minimuma kohereco en la uzado de ĝiaj parolantoj. Tiu baza

Endas emfazi: "tradicio" tute ne signifas ŝtoniĝon de la lingvo. En Esperanton ĉiujare venas novaj vortoj kaj esprimoj, kiuj tamen kongruas kun ĝia tradicio literatura kaj gramatika. Sed ĉiu nova formo devas havi kontakton kun la kohereco tradicia, alie ĝi malhelpus la evoluon de nia idiomo. Kaj jen la tubero en la afero! Evoluo neniam povas esti proponata desupre, per tranĉoj kaj hakoj en nia vortprovizo aŭ gramatiko.

La ĉefa problemo, fakte, ne estas iu aŭ alia propono svaga kaj vakua, sed la sinteno de la proponantoj. Ili misuzas demokration por venene proponi ŝanĝojn plej absurdajn kaj radikalajn, sub la vualo de frazoj kiel "estas nur proponoj..." aŭ "se vi ne ŝatas, ne uzu..." Ŝajne demokratiaj, tiuj frazoj entenas ĝustan kvanton de pseŭdomodesto por eviti publikan kritikon.

Zamenhof diris: "Esperanto ne estas nek devas esti perfekta lingvo. Ĝi devas esti uzata, vivanta lingvo."

Flavio Cimonari Rebello - Brazilo
salaton@zipmail.com.br

FLAVIO CIMONARI REBELLO
 (1972), *brazila esperantisto, studento.*

TRIA LANDA KONGRESO, DU




30 gastoj venis al la urbo Osijek por la 3-a Kongreso de Kroataj Esperantistoj, la 29-an kaj 30-an de majo.

En la jaro kiam la kroata E-movado 110-jariĝis, la kongreso estis dediĉita al "la kroata E-libro". Prezentiĝis la 40-a beletra libro E-lingve aperinta en Kroatio: du-lingva eldono de la novelo *Slavonia arbaro* de Josip Kozarac. Por la kongreso realiĝis ankaŭ Esperanta prospekto pri Osijek, kun financa helpo de la loka turisma asocio. La kongresa rezolucio alvokis al apliko de Esperanto en Eŭropa Unuiĝo.

En majo 2000 la kroataj e-istoj kongresos la 4-an fojon en Sinj (Dalmatio).

La preparoj al la 86-a UK en Zagrebo grande progresas. En junio Konstanta Kongresa Sekretario Nikola Rašić (kiu donis 10-minutan intervjuon la 11-an de jun. en la kroata televido) kunsidis kun la LKK. Multaj el ties anoj venos





Komplezo de Spomenka Stimec

Scienco UK-is en Budapeŝto

Prof. Haszpra partoprenis kiel reprezentanto de UEA en mondkonferenco de 2500 sciencistoj el la tuta mondo.

Sub la titolo “Scienco por la dudekunua jarcento – nova engaĝiĝo”, Unesko kaj Internacia Konsilio por Scienco (ICSU) aranĝis mondkonferencon pri scienco en Budapeŝto, de 26 jun. ĝis 1 jul.

Surbaze de raportoj de dekoj da prepar-konferencoj, Unesko kaj ICSU kunmetis du grandajn dokumentojn: “Deklaro pri scienco kaj la uzo de la sciencaj konoj” kaj “Farendaĵoj pri scienco – kadro por agado”.

Reprezentante neregistaran organizaĵon en oficialaj rilatoj kun Unesko, prof. Haszpra rajtis submeti amendo-proponojn al la du ĉefdokumentoj. Li do formulis kvar proponojn, i.a. kun la atentigo ke la konferenco “devus formuli rekomendojn pri konkretaj solvoj de la senintenco, sed sendube ekzistanta diskriminacio de elstaraj sciencistoj pro ilia manko de lingvokono”. Li informis pri la propedeŭtika,

kultura kaj scienca valoro de E-o. Por laŭbezzone subteni sian proponon, li preparis kelkminutan alparolon.

Tamen, ne okazis publika diskuto pri la amendoproponoj. La dokumentojn, kiujn definitivigis netiga komisiono, oni akceptis per komuna aklamado.

Laŭ Prof. Haszpra estus devinta okazi diskuto punkt-al-punkta pri la dokumentoj – debato kiun povus kompetente partopreni nur iu zorge pristudinta la amason da preparmaterialoj. Li mem ne havis la tempon necesan.

Li konsilas ke UEA indiku tre frue sian intencon reprezentiĝi en Unesko-aranĝoj. Tiel niaj delegitoj povos alveni kun zorge preparitaj alparoloj kaj havi pli da ŝanco influi la okazaĵojn.

La du dokumentoj estos diskutitaj en la kompetentaj organoj de Unesko kaj de ICSU, kun plusendo al UN. ★

Laŭ raporto de Ottó Haszpra - Hungario

spertiĝi en Berlino pri UK-organizado.

Kroata Akademio de Artoj kaj Sciencoj aŭspicias la kolokvon de Akademio de Esperanto en 2001 – konfirmis ĝia prezidanto, d-ro Ivo Padovan, letere al ĉi ties estro, Geraldo Mattos.

Ekzistas plano starigi en Zagrebo, en 2001, E-monumenton de Jasper Neergard, kiu skulptis en 1987 la monumenton “La Espero” por Graz (Aŭstrio).

Nova, 8-a eldono de la “Zagreba Metodo” en la kroata estis plia kontribuo survoje al la jaro 2001. ★

Historio

La subteno de Einstein

“Mi neniam favoris Esperanton” – deklaris en 1950 Albert Einstein, kiu en 1923 ankoraŭ akceptis honoran prezidantecon de SAT-kongreso (vd. feb. ’95, p. 29). Tamen, jen pruvo ke almenaŭ la ĝenerala ideo de iu internacia lingvo ne estis fremda al li. En la ĉi-apuda letero li “deklaras sin preta eniri la Honoran Komitaton de la Ligo por Enkonduko de Internacia Help-lingvo por Stimulado de la Interkompreniĝo, Paco kaj Interpopola Kunlaboro”, en letero adresita al tiu ligo la 18-an de decembro 1929.

Dankon al James R. Piton, kiu trovis la dokumenton sub <http://alexautographs.com>, TTT-paĝo pri aŭkciado de manuskriptoj.

Nitobe en Berlino

Hans Erasmus

Bonvenon al la dua Nitobe-Simpozio (Berlino, 2-3 aŭg.)!

Invititaj estas unuavice ne-esperantistoj. Kongresanoj povos aŭskulti la simpozion en Salono Hodler, se sufiĉaj lokoj disponeblas. Ĉe la informejo vi ricevos enirbileton kaj programon.

En aprilo (p. 69) mi provis klarigi kial dua Nitobe-Simpozio necesas. Nur ĝisfunda starigo de la lingvoproblemo kondukos nin al larĝa kaj profunda diskuto kaj eble havigos la necesajn konstruĵojn por plibonigi la komunik-eblojn. Emfazi la aspektojn ĉiam prezentatajn de la E-movado – lingva egaleco, kultura kaj lingva diverseco, lingvaj rajtoj, demokratio kaj ebla propedeŭtika valoro de E-o – devigas lingvistojn, politikistojn kaj reprezentantojn de NRO-j pripensi la problemaron en tiu kunteksto.

Interesa ekzemplo estas konferenco de Eŭropa Parlamento en oktobro 1998 sub la titolo: “Kiu lingvoj por Eŭropo?” (vd. dec. ’98, p. 218), kiu kunigis diversfakajn kaj -kontinentajn sciencistojn kun oficistoj el diversaj sektoroj kaj politikistojn por diskuti pri la lingvoproblemo en Eŭropo. La organizantoj celis estiĝi malferman debaton, sen ĝeno de politikaj aŭ ideologiaj malhelpoj, kiu konduku al science fundamentitaj rekomendoj pri lingvopolitiko por eŭropaj instancoj. Verŝajne ankaŭ dank’ al lobiado de nia flanko kaj alsendado de la projektoj NEIGHBOUR kaj RELAIS, oni legas en la “konkludaj rimarkigoj” ke la partoprenintoj konsciis pri la neceso respekti la supre menciitajn principojn kaj politikajn starpunktojn. La raportinto skribas i.a. ke ĝis nun oni ne serioze konsideris esplori kaj pritaksi la propedeŭtikan valoron de E-o.

La dua Nitobe-Simpozio estas nova ŝanco kontribui al tia diskuto kaj zorgi ke la prelegontoj kaj debatontoj respektu tiajn principojn kaj vidpunktojn. ★

FONDAĴO EVIDENTE

Ĉi tiu fondaĵo (vd. jan. '98, p. 5), kiun animas la nederlanda esperantisto Jacques Tuinder (Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk), celas konstrui internulejon apud la instituto por vidhandikapitaj infanoj en Batticaloa (Srilanko). Dank' al forta subteno de nederlanda intereklezia televido, la projekto bone progresas. Apogu pere de UEA-konto "jajt-s".

(Dia Regno)

LASTMINUTE PRI LA IJK

Ŝanĝo de kongresejo

La 55-a IJK (9-16 aŭgusto) okazos ne ĉe la lago Balaton, en Zánka. "Pro eksteraj kialoj" necesis fine trovi alian kongreslokon en la urbo Veszprém, 30 km-ojn for de Zánka. Laŭ la organizantoj, Veszprém havas la avantaĝojn de pli facila atingebleco kaj pli intima kongresejo; la suneklipso estos videbla same kiel en Zánka, kaj Balaton situas je 20-minuta busveturado.

El la programo

Suneklipso; tuttaga ekskurso al Budapeŝto (kun politika ludo en la Parlamentejo kaj inaŭguro de Esperanto-Parko); Kongresa Balo kun danckonkurso; Kongresaj Olimpikoj (diversaj sportbranĉoj seriozaj kaj ŝercaj, oratoraj kaj poeziaj konkursoj); Virtuala Kongreso per propra hejmpaĝo.

Kiel ankoraŭ aliĝi?

Se vi lastminute decidis aliĝi — post pli ol 500 personoj el 43 landoj —, kontaktu: Golden Dávid Alko, Damjanich u. 1/c. I. 8., HU-8200 Veszprém, Hungario; hej@math.bme.hu, <http://www.math.bme.hu/~hej/ijk99/aligilo.html>, aŭ aliĝu surloke.

Adreso de la kongresejo: Veszprémi Középiskolai Kollégium, Stadion u. 20-22, HU-8200 Veszprém. Gi atingeblas per la buso

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la inform-oceano de Tut-Tera Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj konsultindaj paĝoj Esperantaj!



BIBLIOTEKO

La serĉprogramo TROVANTO de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (ĉiuj libroj, broŝuroj kaj manuskriptoj venintaj al IEM post junio 1996) enhavas jam pli ol 3800 titolojn: http://www.onb.ac.at/online_s/esperanto/espdb.html

HANDIKAPULOJ

Asocio de E-istoj-Handikapuloj: <http://try.physik.uni-erlangen.de/~soezueer/ae/>

KOMPUTADO

Kiel uzi Esperanton sub Linukso. Instruaro de Wolfram Diestel: <http://www.uni-leipzig.de/esperanto/texte/bibl/kielfari/kielfari.html>

REVUO

La aŭstralia/nov-zelanda *Esperanto Sub la Suda Kruco* (red. Donald Broadribb) nun legeblas ĉe <http://www.poboxes.com/esk>

TRADUKADO

Novajoj el la ĉĥa literaturo:

La baptado de caro Vladimir: <http://www.rano.demon.co.uk/vladimir>

Diversaj: <http://mujweb.cz/Kultura/malovec/>

Tri Esperanto-dokumentojn de UEA (Symoens, Chiti-Batelli) hungarigis István Mészáros kaj sendis ilin al la Hungara Elektronika Biblioteko: <http://mek.iif.hu/porta/szint/tarsad/nyelvtud/proped/>; nyelvtud/eszpol/; nyelvtud/hegemon/

CETERAĴO

"Vi devas esti almenaŭ 21-jara" — ŝajne por esperantigo de siaj intimaj paĝoj atendas helpon "adolta knabino": <http://www.grownupgirl.com/esperant.html>

n-ro 4 (haltejo "Stadion u. 19/a".) Akceptejo funkcios la 9-an de aŭgusto de la 10-a ĝis la 23-a horo en la studenthejmo.

Por urĝaj lastmomentaĵoj uzu la porteblan ☎ +36/30/922-78-20

(Laŭ informoj de Lariko Golden)

TEJO PRI (INTER)NACIISMO

Ĉu la nuna junularo havas mal-saman rigardon al naciismo kaj internaciismo ol la antaŭa? Kiel nian pensadon influas niaj diversaj kulturaj fonoj? Ĉu la E-movado devas repripensi la konceptojn "internaciismo, naciismo, sen-naciismo"? Jen kiajn demandojn pesos la TEJO-seminario pri

"Internaciismo kaj naciismo — ĉu konfliktaj aŭ kompletigaj ideoj?" en Strasburgo (Francio), de 24 ĝis 31 oktobro, ĉe la Eŭropa Junulara Centro de Konsilio de Eŭropo.

35 lokoj atendas unuavice eŭropajn TEJO-membrojn, sed povos esti invititaj 2-3 ne-eŭropanoj. Ne necesas specialaj konoj pri la seminario temo, sed nepras aktiva kontribuo al la tema programo. La partoprenkotizo estas 280 francaj frankoj (€ 42,70); vojaĝkostoj estas repagotaj. Aliĝu ĝis 10 septembro; ne-eŭropanoj kaj vizobezonantoj antaŭ 27 aŭgusto. Kontaktu: Grigorij L. Arosjev, 117071 aĵa 31, Moskvo, Rusio; ☎ +7/095/476-14-72; arosjev@fnmail.com.

Reagoj



Laŭdon al VEB

Plene mi konsentas kun M. Malovec ("Ĉu ni preterdormos inform-eksplozon?", majo, p. 91.) pri la dezirindeco de enciklopediaj informoj en Esperanto. Sed mi opinias ke li iom malsufiĉe lumigis la literaturan fakon de Virtuala Esperanto-Biblioteko (<http://www.esperanto.net/veb>). Tie, en la listoj de Don Harlow, troviĝas certe pli da literaturaroj — malnovaj kaj novaj — ol en la komparebla nederlanda/flandra Projekto Coster (<http://www.dds.nl/~ljcoster>). Mi kuraĝus aserti ke eĉ en privataj retejoj (ekz. de Juri Finkel aŭ de Harlow mem; ambaŭ alireblaj per tiu VEB-listo) troviĝas pli da verkoj ol en la kompara nederlanda ejo. VEB meritas iom pli da laŭdo (malgraŭ ke ĝi kreskas "spontane, sen kunordigo"), ankaŭ pri aliaj fakoj.

Cetere, iu kiu serĉas nederlandlingvan literaturon en la reto, trovos ankaŭ

dekojn da Esperanto-tradukoj en la paĝoj de Projekto Coster.

Wouter F. Pilger - Nederlando

Papa' kaj mama' plaĉas

Aplaŭde mi konsentas la proponon de U. Broccatelli (majo, p. 90), pri la neologismoj *papao* kaj *mamao*, apostrofeblaj kiel *papa'* kaj *mama'*. Lia simpla, sed trafa ideo riĉigas la lingvon kaj meritas oficialigon.

Frits Zeiler - Nederlando

Enamiĝis

Senretene mi enamiĝis al la recenzo de Tonkin (apr., p. 73), nepre mi devas havi *Durankulak* de Sabira... Mi rekomendas plu havi tiajn recenz(ist!)ojn, kiuj estas jam de si mem plezuro por la leganto!

Cristina de' Giorgi - Italio




Ne loka gazeto

Utilus publikigi korekton: *Hemmets Journal* (apr., p. 76) estas la plej granda porfamilia magazino en Svedio kaj eĉ la plej granda semajna magazino. Ĝi havas laŭ sia propra statistiko 686 000 legantojn (el kiuj 513 000 estas virinoj) kaj eldonkvanton de 272 900. La plej multaj iras al fidelaj abonantoj.

Anna Ritämaki - Finnlando

Unua paŝo al paco

Milito ĉiam urĝe minacas, kaj pacifismaj klopodoj ofte cedas al tiu nigra potenco premega kaj ŝtatisma. La duobla Hodlera devo menciita de K. Enderby ("Iam ĉesos bleki la kanonoj", majo, p. 84) direktis nian vojon, sed al mi ĝi ŝajnas iom arbitra.



Lastatempe mi esploras por universitata tezo pri homo kiu rifuzis militservon dum la mondmilito dua. Traleginte la aŭtobiografion de s-ro KITAMIKADO Zirô (1913-) — nun iom konata kiel elstara japana tradukisto de Lev Tolstoj, sed vivteninta sin kiel agrikulturisto —, mi ĝisoste konvinkigis ke la nura ĝusta kaj pleje adekvata konduto

por la nuna esperantistaro estus la senperforta rimedo. Temas pri helika irado kontraste kun milito minacmiena — sed kvietra, malgranda paŝo havas pli da signifo ol misilo ĉiam erarplena. Mi ne estas revulo, kiu naive kredas je tutmonda forigo de la armilaro aŭ de la konskripcia rekrutado, sed mi neniel povas kredi ke soldatigo kondukos nin al paco. Mi emfazas per tuta forto ke sistema konsciencmotiva rifuzado de militservo estus iel realigebla.

Usui Ryô - Japanio

Protektu la stelon

Kiel komunikis Saeed Farani (feb., p. 30), en Pakistano la verda stelo ekhavis alian signifon ol en Esperantujo. Oni povas trovi ankaŭ aliajn ekzemplojn de misuzo de Esperantaj simboloj. Mi vidas nur unu eblon preventi estontajn misuzojn. La simboloj de Esperanto devas esti oficiale registritaj kiel intelekta propraĵo de la Esperantomovado. Ĉi tiun fideinde reprezentas UEA, kiu havas juran personecon. Tial UEA registru siajn rajtojn je ĉiuj Esperantaj simboloj por poste *senpage* permesi ilian uzon al Esperantaj organizoj kaj firmaoj — kaj ne permesi al ne-Esperantaj.

Aleksandr Fiŝkin - Rusio



El la poŝtkesto

Dankon pro solidareco!

Lastatempe, rilate la sangajn eventojn en Kosovo kaj Serbio, pluraj samideanoj el Esperantio esprimis sian solidarecon al niaj kompatindaj sampatrujanoj el Kosovo, cetere esperantistoj.

Ili eĉ pretas gastigi en siaj hejmoj multajn e-istajn rifuĝintojn, samkiel tio eble okazis antaŭe kun bosniaj aŭ kroaciaj samideanoj.

Radio Aŭstria Internacia la 1-an de majo telefone petis nin traserĉi en la albaniaj

tendaroj de rifuĝintoj el Kosovo e-istojn, por ke poste oni aranĝu ilian provizoran restadon en Aŭstrio.

S-ano Henri Masson el Francio alvokis per Interreto gastigi albanojn en tiu lando, esprimante la deziron de multaj francaj esperantistoj.

Nelaste ankaŭ Amikeca Reto per letero al nia s-ano Shaban Hasani alvokis konkrete por tri esperantistoj el Kosovo, kiuj probable troviĝas en Albanio.

Al ĉiuj supre menciitaj samideanoj kaj organizaĵoj ni tutkore esprimas nian senfinan dankemon.

Bardhyl Selimi - Albanio



Kun viaj kontribuoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi fotas aŭ disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Freŝdataj portretoj de aktivaj esperantistoj estas aparte bonvenaj. Koran dankon!

Kalendaro 1999-2000

Kvankam ni laŭeble kontrolis la divers-fontajn informojn pri la menciitaj aranĝoj, ni ne povas garantii la fideindecon de ĉiu ero en ĉi tiu kalendaro. Informoj jam aperintaj en marto (p. 49-52) ne nepre estas ripetataj. La sekva kalendaro aperos en la novembra numero.

julio

31 jul.-07 aŭg.: **84-a Universala Kongreso de Esperanto**, Berlino, Germanio (CO de UEA, adreso en la kolofono, <http://www.esperanto.de/uk99>; temo: "Tutmondiĝo — ŝanĝoj por paco")



Dum UK: **Baza Cseh-kurso kaj A-seminario** (IEI)

aŭgusto

- 01-07: **Kulturaj aranĝoj**, Grésillon*, Francio (Pekudrado kun Marie Malézieux; E-kursoj de Georges Lagrange, Daniel Moirand kaj, por komencantoj, Przemek Grzybowski)
- 06-08: **2-a Nordorienta Ĉina Kongreso de E-o**, Anshan, Ĉinio (Wu Guojiang, Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 Liaoning; ☎/✉+86/413/710-08-71)
- 07-12: **Pri verda politiko**, seminario de Asocio de Verduloj E-istaj, Jetřichovice, Ĉeĥio (Michael Wolf, Heinrich-Heine-Str. 62, DE-01844 Neustadt, Germanio; ✉michalupo@aol.com)
- 07-13: **33-a ILEI-Konferenco kun B-ekzameno kaj C-seminario Cseh-metoda**, Karlovy Vary, Ĉeĥio (Bertil Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; temo: "Edukado al la paco")
- 07-14 kaj 14-21: **Renkontiĝo de E-lingvaj Familioj resp. Familia Feriado**, Przytok ĉe Zielona Góra, Pollando (Christoph Knabe, Dormmunder Str. 9A, DE-10555 Berlin, Germanio; ☎/✉+49/30/391-39-78; ✉knabe@tfn-berlin.de)
- 08-13: **5-a Interreligia Seminario E-ista de Asisti**, samtempa kunsido de Universala Tao-Stud-

Ligo E-ista, Kędzierzyn-Koźle, Pollando (Asisti, Skr. 147, PL-47-220 Kędzierzyn-Koźle)

- 08-14: **Kulturaj aranĝoj**, Grésillon*, Francio (jogo kun Rose-Marie Laveau, kurso de Daniel Moirand)
- 08-15: **E-semajno de naturamikoj**, "La Martinière", apud Niort, Francio (Georges Menossi, Rue des Monfortains, FR-79160 Saint-Pompain)
- 09-16: **55-a Internacia Junulara Kongreso**, Veszprém, Hungario (LKK, Pí. 87, HU-1675 Budapest; ☎+36/88/424-339;



✉+36/1/282-88-85; ✉hej@math.bme.hu, <http://www.math.bme.hu/~hej/ijk99>; temo: "Komunikado en la informosocio")

- 10-14: **Preparado al la skriba parto de la ekzameno pri kapableco**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Georges Lagrange)
- 10-15: **Literatura kurso** kun Spomenka Štimec, Hrašćina-Trgovišće, Kroatio (Orbis Pictus*)
- 13-16: **18-a Internacia Literatura Forumo**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE*; temo: "Stellan Engholm")
- 14-20: **39-a Internacia Somerlernejo**, Barlaston*, Britio
- 15-21: **Kulturaj aranĝoj**, Grésillon*, Francio (Teatro kun Sylvie Bonnet, E-kursoj de Christian Rivière kaj Janine Dumoulin)
- 16-22: **La plej aktualaj temoj de astronomio**, Hrašćina-Trgovišće, Kroatio (Orbis Pictus*, d-ro Hans Michael Maitzen kaj Maja Tišljär)
- 17-21: **4-a Ĉina E-Kongreso**, Pingxiang, Ĉinio (Ĉina E-Ligo, P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing, ☎+86/10/68-32-66-82; ✉68-32-18-08; ✉cel@china-report.com)

- 17-21: **Multlingva staĝo**, inicado al diversaj naciaj lingvoj pere de E-o, Kvinpetalo*, Francio
- 18 aŭg.-21 dec.: **Tutsemestra Kurso Internacia**, Karlskoga, Svedio (Folkhögskola, Lars Forsman, Box 192, SE-691 24 Karlskoga; ☎+46/586/64-600; ✉Lars.Forsman@fhs.karlskoga.se)
- 21-26: **68-a Itala kongreso de E-o**, Riva del Garda (Trento), Italio (Itala E-Federacio, Via Villorresi 38, IT-20143 Milano; ☎+39/2/58-10-08-57; ✉esperanto@esperanto.it, <http://www.esperanto.it/fei/congresso/1999/index.html>; temo: "La rajto je komunikado")

22-25: **2-a Azia E-kongreso**, Hanoj, Vjetnamio (Vjetnama E-Asocio, 105A Quán Thánh Str., Hà Nội; ☎+84/4/232-012; ✉8733-02-01; ✉kaem@egroups.com; temo: "Kunlaboro por paco, stabileco kaj disvolv")



- 23-29: **14-a Kafoklaĉa Internacia Somera Renkontiĝo (KISO)**, Marburg, Germanio (Marburga E-Grupo, Afföllerstr. 19, DE-35039 Marburg/Lahn; ✉kiso@esperanto.nu)
- 23-31: **5-a Internacia Arkeologia Laborbrigado**, Blera (Viterbo), Italio (Pier Luigi Cinquantini, via Dante Alighieri 2, IT-01010 Blera (VT); ☎/✉+39/761/479-503; ✉pcinqua@tin.it, <http://space.tin.it/lo/pcinqua/ial.htm>)
- 27-29: **Taj-ĉi-ĉuan**, ĉinaj ekzercoj kaj ilia filozofio, kaj **Ludoj**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Petro Smith resp. Gilène Tilleux)
- 28: **Limburga E-Tago**, Bree, Belgio (E-Societo, Panhovenstr. 10, BE-3990 Peer; ☎+32/11/635-592)
- 28-04 sep.: **25-a Internacia Semajno kun Metodika Seminario pri Cseh-metodo**, Sète, Francio (Esperanto, 5 rue docteur Roux, FR-34040 Montpellier; ✉+33/4/67-54-15-42)

* ADRESARO

Jen la adresoj signitaj per asterisko tra la kalendaro rubriko. Ĉiuj aliaj adresoj troveblas post la koncernaj aranĝoj.

Barlaston: Derek Tatton, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs., Britio ST12 9DG; ☎+44/1782/372-105; ☎372-393; ✉wedgwood.college@staffordshire.gov.uk

Grésillon: Kultura Esperanto-Domo, FR-49150 Baugé, Francio; ☎+33/2/41-89-10-34

KCE: Kultura Centro E-ista, C.P. 311, CH-2301 La

Chaux-de-Fonds, Svislando; ☎/✉+41/32/926-74-07

Kvinpetalo: FR-86410 Bouresse, Francio; ☎/✉+33/5/49-42-80-74; ✉rapple@club-internet.fr

Orbis Pictus: Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste, ☎/✉+39/40/767-875, ✉orbispictus@iol.it

Poprad: E – Regiona Societo, Sobotské nám. 36, SK-058 01 Poprad, Slovakio; ☎/✉+421/92/32-419

septembro

- 01-15: **4-a Internacia E-Ferado**, Krościenko, Pollando (Pola E-Asocio, Rondo en Krościenko n/D, ul. Kingi 6, PL-34-450 Krościenko n/D)
- 02-05: **Mikologia seminario**, Poprad*, Slovakio
- 03-05: **Skota studrondo**, Dunblane, Skotlando, Britio (Jean Bisset, 47 Airbles Crescent, Motherwell, ML1 3AP; ☎+44/698/263-199)

- 03-05: **4-a Hansa E-Tago**, Stokholmo/Tallinn, Svedio/Estonio (Virve Ernits, Mahla 65-1, EE-11215 Tallinn, Estonio; ☎+372/2/585-775)
- 04-05: **Aŭtunaj tagoj**, insularo de Turku, Finnlando (E-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki; ☎+358/9/715-538; ✉laakju@koti.tpo.fi)
- 04-10: **7-a Internacia Turisma Semajno**, Malto (Malta E-Societo, P.O. Box 132, Valletta CMR 01; ✉maltaesp@global.net.mt)
- 10-15: **La E-literaturo ekde 1952**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Ed Borsboom)
- 11-13: **Literatura festivalo**, Mantova, Italio (Laura Brazzabenì, Via Montanara Sud 91/a, IT-46010 Campitello [Mantova]; ☎/✉+39/376/926-099; ✉lbrazza@iol.it)
- 17-19: **Faulhaber-semajfino**, Elspeet, Nederlando (Hans ten Hagen, Middenweg 587, 1704 BH Heerhugowaard; ☎+31/72/571-79-18; ✉754-76-70; ✉ten.hagen.esperanto@wxs.nl; temo: "Mono")
- 17-19: **Surpriza Semajfino**, Hrašćina-Trgovišće, Kroatio (Orbis Pictus*)
- 18-19: **12-a E-Tago**, Pardubice, Ĉeĥio (E-klubo, Na Okrouhliku 953/21, CZ-530 03 Pardubice; +420/40/661-19-41)
- 23-26: **10-a Montkabana Renkontiĝo**, Ober-tauern, Aŭstrio (Aŭstria E-Junularo, Pf. 804, AT-8011 Graz; ✉H9250888@obelix.wu-wien.ac.at)
- 24-26: **15-aj Artaj Konfrontoj en E-o** (ARKONES-99), Poznań, Pollando (Zbigniew Kornicki, Os. Bol. Smialego 7/22, PL-61 002 Poznań)
- 26: **Trilanda Renkontiĝo**, Vaals, Nederlando (Trude Sinno, In 't Oord 45, NL-6291 VN Vaals; ✉sinno@ibac.rwth-aachen.de)


oktobro

- 08-11: **53-a Argentina Kongreso de E-o**, San Carlos de Bariloche, Argentino (Alejandro Cossavella, Lilinquén 309, Pinar de Festa, AR-8400 San Carlos de Bariloche; ✉hostnotros@infovia.com.ar; temo: "Naturprotektado kaj vivkondiĉoj")
- 08-11: **Internacia Amikeca Renkontiĝo**, Aylesford, Britio (A. Page, 37 Bullfinch Close, Riverhead, Sevenoaks, Kent, TN13 2BB; ☎+44/1732/456-916; gasto: Marjorie Boulton)
- 09-10: **31-a Korea Kongreso de E-o**, Seulo, Koreio (Korea E-Asocio, 1601 Kangbyon Hanshin Core B/D, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul — 121-703; ☎+82/2/717-69-74; ✉717-69-75; ✉keast@soback.kornet21.net, http://www.esperanto.or.kr; temo: "Lingvo-problemoj en internaciaj neregistraj organizaĵoj")
- 09-11: **6-a Internacia Semajfino E-ista**, Okemo, Ludlow, Vermonto, Usono (Normand Fleury, 6358 rue de Bordeaux, Montréal [QC], Kanada H2G 2R8; ☎+1/514/495-84-42; ✉272-

- 01-51; ✉esperanto@sympatico.ca, http://www3.sympatico.ca/esperanto/okemo.htm)
- 15-17: **9-a Kongreso de Ĉeĥa E-Asocio**, Tábor, Ĉeĥio (Ĉeĥa E-Asocio, p.k. 1069, CZ-111 21 Praha 1; ☎+420/653/611-823; ✉+420/2/803-608; ✉cea@tinet.cz)
- 15-17: **86-a Japania E-kongreso**, Motizuki Nagano, Japanio (Japania E-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162; ☎+81/3/32-03-45-81; ✉32-03-45-82; ✉jei@mre.biglobe.ne.jp)
- 16-18: **5-a Kolombia Kongreso de E-o**, Ibageo (Tolimo), Kolombio (Kolombia E-Ligo, Calle 7A # 56-76, Casa 12, Cali, Valle)
- 24-31: **TEJO-seminario**, Strasburgo, Francio (Gri-gorij L. Arosjev, RU-117071 aĵa 31, Moskvo, Rusio; ☎+7/095/476-14-72; ✉arosjev@fnmail.com; temo: "Internaciismo kaj naci-ismo — ĉu konfliktaj aŭ kompletigaj ideoj?")
- 26-30: **Praktikado de la lingvo**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Juanita Turbillon)

novembro

- 05-09: **1-a Internacia Konferenco pri Agrikulturo kaj medio**, Xi'an, Ĉinio (Xi'an-a E-Asocio, p/a Vicio, Jian-Gong-Lu 3, Xi'an CN-710043; ✉vicio@esperanto.nu; ☎/✉+86/29/22-32-95-20)
- 06-07: **Nordfranca Eŭropa Rendevuo**, Morbecque, Francio (Jean Dietrich, 104 rue J. Jaurès, FR-59192 Beuvrages; ☎+33/3/27-33-79-31)
- 06-07: **10-a Kongreso de Ukrainia E-Asocio**, Kievo, Ukrainio (Vladimir Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kijiv; ☎+38/44/295-701; ✉295-28-70; ✉lnp@un.kiev.ua)
- 13-15: **10-a Sudbrazia E-Renkontiĝo kaj 5-a Interlanda Konferenco pri Instruado**, Florianópolis, Brazilo (E-Asocio de Santa Catarina, C.P. 469, BR-88010-970 Florianópolis - SC; ✉marcofer@cfh.ufsc.br)
- 27: **Malferma tago de la Centra Oficejo**, Roterdamo (adreso en la kolofono)



decembro

- 03-05: **Renkontiĝo je Sankta Nikolao**, Murzasichle, Pollando (Poprad*)
- 10-15: **Zamenhofa semajno**, Kvinpetalo*, Francio

- 22-04 jan.: **12-a Konferenco de Internacia Komunista E-ista Kolektivo**, Havano, Kubo (Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell, Hispanio; ☎+34/9/37-27-50-21; ✉luis_serrano@mixmail.com)
- 27-03 jan.: **43-a Internacia Seminario**, Wetzlar, Germanio (Germana E-Junularo, Grellstr. 36, DE-10409 Berlin; ☎/✉+49/30/428-57-899; ✉bero@esperanto.de, http://www.esperanto.de/is/1999/is99.html; temo: "Jarmilo finiĝas — kio estas malantaŭ ni?")
- 27-03 jan.: **16-a Internacia Festivalo**, por familioj kaj personoj 2555-jaraĝaj, Münster, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein; ✉+49/5624/8007, http://www.quicknet.se/home/q-111060/intfest.htm; temo: "Eŭropo")




2000

- 26 feb.-07 marto: **3-a Internacia Himalaja Renkontiĝo**, Nepalo (Nepala E-Asocio, P.O. Box 10518, Kathmandu; ☎+977/1/410-725 [s-ro L.P. Agnihotri], ✉227-230; ✉sosierra@wlink.com.np)
- 27 apr. - 01 majo: **4-a Eŭrop-Unia E-Kongreso**, Oostende, Belgio (E-grupo La Konko, Elisabethlaan 295, BE-8400, Oostende; ☎+32/59/502-708)
- 13-19 majo: **52-a Internacia Fervojista Kongreso**, Budapeŝto, Hungario (LKK, Pf. 7., HU-1378 Budapest)
- 13-19 jul.: **Kultura Arta Festivalo de E-o**, Tuluzo, Francio (EUROKKA, FR-31450 Donnevillè; ☎/✉+33/5/61-81-95-95; ✉eurokka@esperanto-org)
- 25 jul. - 01 aŭg.: **85-a Universala Kongreso de E-o**, Tel-Avivo, Israelo (CO de UEA)
- 05-12 aŭg.: **56-a Internacia Junulara Kongreso**, Honkongo, Ĉinio
- 12-18 aŭg.: **40-a Internacia Somerlernejo**, Barlaston*, Britio
- 13-19 aŭg.: **7-a Kultura Esperanto-Festivalo**, ĉe Helsinko, Finnlando (KEF 2000, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki; ✉aritamak@ra.abo.fi)
- 10-13 nov.: **KAEST 2000**, kolokvo "Aplikoj de E-o en scienco kaj tekniko" (KAVA-PECH, Petro Chrdle, adreso en la kolofono)

2001

- 21-28 jul.: **86-a Universala Kongreso de E-o**, Zagrebo, Kroatio (CO de UEA, adreso en la kolofono)



Recenzoj

Originala prozo


Rakontoj pri soluloj kaj putinoj

La paneo kaj aliaj noveloj. Sergo Elgo (1928). Vieno: IEM, 1998. 159p. 23cm. € 12,00. **Promeso en obskuro.** *Noveloj.* Manuel de Seabra (1932). Vieno: IEM, 1997. 110p. 23cm. € 10,50.

La paneo konsistas el 12 noveloj de Sergo Elgo (laŭdire bone konata franco). Kvinon el ili karakterizas mistera, sonĝeca aŭ fantasta rakontfaden (rekte sciencfikcia en unu kazo), dum la ceteraj pritraktas la vivojn de diversaj nuntempuloj, ofte solecaj aŭ solemaj, kun insista ripeto de etosoj kaj, ĉefe, de temoj: (re)namigoj, elrevigoj, pase-nostalgio...

Nek lingve nek enhave Elgo ambicias revolucii nian prozon. Ĉi verkon mi etikedus "serioze distra". Li verkas en stilo senpretende flua, eleganta, bele simpla. La lingvon li mastras kvazaŭ denaske, sed detenas sin de provoj virtuozi aŭ de skolismoj. Kiel preskaŭ ĉiuj nunaj originalaj prozistoj, ankaŭ li jen kaj jen neologismas: *aperti, ĉipa, ĵinso, lanta, liva, nupto, olda...* eĉ *sor-* kaj *sob-*, sed en Esperanto tiel proksima al la Pirona idealo de "la bona lingvo" ĉi apartaĵojn de Elgo mi rigardus licencioj.

Ĉu direblas la samo pri *Promeso en obskuro*? Ne tute. En ĝi troveblas neologismoj eble iom pli abunde kaj aŭdace: la oportuna *fotri* (*ĉikani*, vulgare), la kialnea *ŝaruto* (manfarita cigaredo, rulaĵo) aŭ



la strange entrudita *recente* (por *antaŭ nelonge*). Tamen la problemoj kuŝas aliloke. Jen aperas vortoj senklarigaj: *bakŝiŝo, o keĵ, parkometro, baro* (por startrinkejo); iberlingvismoj kiel *karamelo* anst. *bombono, farbita* anst. *ŝminkita* kaj eĉ *plato* anst. *telero*; misformoj kiel *pezigi* anst.

Ne suferigu!

Tien. Romano. Johán Valano (ps. de Claude Piron, 1931). Vieno: IEM, 1997. 139p. 23cm. € 11,10.

Meze de nia ĉiutaga mondo malperfekta, kelkaj homoj hazarde trovas alian mondon, kies loĝantoj scias la arton feliĉi. Ankaŭ la vizitantoj el nia mondo tuj lernas tion kaj revenas al la ordinara estado pli kapablaj elteni ĝiajn turmentojn.

Unu vizitanto estas Klaŭdjo, psikoterapiisto, kiu poste verkas Esperantan libron pri sia sperto. Ĉi tion rakontas Johán Valano, pseŭdonimo de Claude Piron, psikoterapiisto kaj Esperanta verkisto. Ĉu komplike?

La ŝlosilan trukon de la feliĉiĝo ni ne ekscias, sed ĝi okazas dum stranga interna sperto, kvazaŭ en hipnodramo, kie oni respertas psikan traŭmaton, tamen kun nova kapablo elteni tiun. Poste oni resaniĝas de deprimiĝoj kaj neŭrozoj kaj lernas ne suferigi, kio ankaŭ kondukas al malpli da propra sufero.

Kiel bona aŭtoro, Valano en sian paradizon enkondukas – se ne vipuron, do almenaŭ kolubron, malkontentan paradizanon. Malgraŭ tio la verko iom suferas de klasika problemoj: en la vivo ni aspiras sanktan harmonion, sed en la arto tiu gustas iom sensale.

Ĉi tio estas romano grandparte bone koncipita kaj tajlita, kaj verko kun grava kaj simpatia mesaĝo. Kelkaj aferoj tamen impresas malpli sukcese. Ekzemple Valano

pesi, rezigni anst. *rezignacii, ŝrumpita* kaj *indignite* anst. la sole eblaj *-inta* kaj *-inte*, aŭ (kiel ĉe Elgo) stumbligaj infinitivoj senpere post prepozicioj.

Kvankam literature Seabra montriĝas multe pli matura, interesa kaj metieca ol Elgo, ĉi tiu venkus en stila komparo. Kial? Ĉar la lingvaĵo de Seabra sonas iom malglate, malnature, kvazaŭ traduko, kiel se li malhavis en Esperanto voĉon kaj tonon proprajn. En Esperantujo mankas profesiaj (t.e. salajrataj) korektistoj kaj editoroj, kaj do ni trovas ke nur verkoj de perfekte-muloj stilkaresaj aperas en formo (sufiĉe) senerara. Eldonistoj sciis ke pro tiaj makuletoj la verkoj de Seabra riskas ne ricevi saman aprezon inter ni kiel en la publikoj kataluna kaj portugala.

Nun, bonŝance, tiuj mankoj ne malebligas plezuritan legon de la libro. Kataluniĝinta portugalo, profesie verkisto kaj tradukisto, senlaca kosmopolito kaj poligloto, Manuel de Seabra prezentas kolekton de 23 noveloj kun la komuna temo "putinoj" (ĉi vorton uzadas li mem tra la novelaro). Li priskribas ilian kruelan kaj obskuran, humiligan vivon el ilia propra viv- (ne nur vid-aŭ fik-) punkto. Kruele kaj obskure, tra kiuj oni tamen devas vivi en ĉi mondo de punitoj kaj putinoj. Sed li prezentas ankaŭ la puron, fidelon kaj dignon de putinoj, foje amuze, humure, okulsigne, neniam kun larmomelka kompato. Putinoj en de-

okupiĝas multe pri la "junto" inter la ĉiutaga realo kaj tiu alia mondo, plurfoje diskutante ties ekziston kaj esencon – nenecese, ĉar en romano oni ja akceptas ion kio en vojaĝraporto vekus nekredemon. Pri la sorto de la paradiza "disidentoj" oni ekscias en sonĝo tute ne sonĝosimila: eble ne la plej trafa solvo. Ankaŭ sufiĉe longa diskuto fine de la verko, ĉu ellasi tiun aŭ ĉi tiun eron, ŝajnas superflua. Pli da kuraĝo, kara Klaŭdjo! Fidu la potencon de fikcio kaj la akceptemon de legantoj!

Sian optimisman mesaĝon la aŭtoro prezentas en facila, plaĉa lingvo kun flua rakonta tono. Kvankam ĉi libro sufiĉe mal-similas la konatajn Ĉu-librojn de Johán Valano, oni same facile kaptiĝas de ĝia evento-ĉeno.

Sten Johansson - Svedio

Por infana okulo malsata

La knabo frenezeta. 1998. 106p. 23cm. € 9,00. **Flicts.** 1999. 48p. 26cm. € 8,40. Ambaŭ: Ziraldo (1932). El la portugala trad. Kristoĉjo Resende (1988). São Paulo: Melhoramentos.


Mankas taŭgaj legaĵoj en Esperanto por infanoj! Kiom ofte aŭdeblis tiu vekrio! Konfrontita kun tiu bezono mem, mi devas konstati la malon: kioma multo kaj vario troveblas — certe tasko por ILEI estos katalogi tion. Jen du pliaj pruvoj de mia aserto.

Unue, rakonto pri petola dekjara knabeto en aŭtentike petola stilo. Je verko mem- (aŭ ies-) deklare tradukita de vera 10-jara frenezuleto, taŭgas recenzo de iu kun simila aĝo kaj eco. Do, al 7-jara Hajni la demando: “Kiun paĝon vi plej ŝatis?” Senhezite: “Tiun! (la dektrian).” “Kial?” “Ĉar tie estis ĉio kio estis ĝis tio.” Efektive, en paĝoj 1-12 Ziraldo prezentis al ni la frenezuleton per serio da priskribaj esprimoj kaj idiomoj bildigoj, kaj la dektria paĝo bizare sintezigas ĉiujn tiujn forme malkongruajn ecojn. En tia libro, bilda originaleco kaj lingva sprito esencas; la tradukinto havis pezan taskon, foje oni sentas ke malantaŭ la Esperanta solvo kuŝas iu portugala idiomaĵo. Kelkloke efektive aperas preskaŭ klarigo, ekz. “Li havas fajron sur la vosto (neniam restis sur la sama loko)”. Oni scivolas ĉu tio staris en la originalo aŭ estis traduka aldono. Je manko de klarigo ĉu ni ĉiuj same interpretas, ekz. “Tuto jam sata sed okulo malsata”? Ne-grave, la tuto ĝueblas, recipe ĉe laŭtleĝado.

Tra la postaj paĝoj ni konatiĝas kun la bubo, pere de ties hejmtaskoj kune kun nerajtigataj aldonaĵoj, sekretaj desegno-ludoj, preferata bildstrio (kun ĝis nun ne perceptitaj aspektoj



atingoj kaj propra unika horloĝo, provizanta sufiĉajn horojn por enpaki ĉiun deziran frenezajon en unu tagon. Kio fariĝos el tia frenezuleto? La libro tion fine malkaŝas, sed nek Hajni nek mition faros.



de la malkovro de Brazilo), manka verseto, kanzono, sportaj kaj amindumaj

Flicts (pron. Flike) ne trovas sian lokon en la mondo. Ĉi tie, tie, jene, alie, plie, plue li serĉas, sed oni ne akceptas lin... ŝin... ĝin... Eble la lasta, ĉar *Flicts* estas nek orfo, nek forlasita dorlot-besto, nek

flankenŝovita butikum-ĉaro, sed... koloro, iom malŝablone helbruna. La grandaj paĝoj de la libro frapas (vere!) simplaj kaj nekutimaj. Ilustraĵoj estas pure-nure koloraj blokoj aŭ formoj. Kiel en la alia libro, teksto stiltrafe minimumas — foje frazo sola, maksimume kelkaj. En tiom klara granda litertipo ke infano kiel Hajni facile ĝin legas por si mem (des pli flue se gepaĉjo jam la antaŭan nokton deklamis). En ambaŭ ver-

koj ni trovas amuzan ne-ortodoksan stilon: multaj belaj ideoj kunpakitaj en vortuman minimumon, ĉi-kaze oni sentas neniun riskon de traduk-perdo.

Kompreneble, la “fragila, febla kaj afliktita *Flicts*” librofino trovas siajn lokon kaj valoron — mi ne diru kie, kiel — eĉ sen tio, Hajni jam pli frue kompatis l... ŝ... ĝin, ĉe paĝo 14, kie ĝi estis fortunita de kraĵon-ujo jam plena je pli buntaj koloroj, dirante, “Ho, Flike, se vi volas, vi rajtas veni loĝi en mia kraĵon-skatolo!”

Hajnal kaj Stefan MacGill - Hungario

zerto, en Barato, Iberujo, Mediteraneo, Papuujo, Brazilo, en la neelĉerpeblaj putinoj de Usono kaj Eŭropo.

Jam de la tria novelo oni atendas la frazon kiu elmontras la putinecon de la historio, kaj li sukcesas prezenti la situaciojn nove, tamen kredeble. Lerte li envoĉigas en la personojn, per kelkaj frazoj li transmetas nin en etoson aŭ atmosferon foran kaj nekonatan, kvankam ĉi-mondan kaj eble samtempan. Malgraŭ kelke da noveloj kun fino iom plumpa, hasta aŭ antaŭvidebla, en la plimulto li kreas veran literaturon, ne surogaton por snoboj. Sentabue li prozas pri oldiĝo de putinoj, pri violento, travestiuloj kaj transseksuloj, putinistoj... Umas en lia prozo ne la kabinetaj, anekdotaj E-putinoj de Beaucaire, sed la matraculinoj anonimaj kaj grand-animaj de nia hipo-

krita liberalisma mondo. Seabra evidentiĝas ne afekta, sed aŭtenta, maldekstrulo. Ĉar fakte ni ĉiuj vole-nevole nin prostituas: kiu rutinas, tiu putinas.

Jen do la leginda Seabra, kun stilo malpli

eleganta kaj flua ol la plej bonaj Steele kaj Johansson, kaj tamen anime (ne lingve!) iel parenca al la romanoj de Piĉ. La kolekton mi rekomendas sincere kaj putine.

Jorge Camacho - Hispanio

Alain Fournier

La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.
La sola verko de la aŭtoro,
kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo, 1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: € 10,20.


Vortaro meza nur laŭnome

Hungara-Esperanta meza vortaro. *Magyar-Eszperanto kéziszótár.* István Szerdahelyi (1924-87) kaj Ilona Koutny (1953). Budapest: Hungaria E-Asocio, 1996. 12+835p. 21cm. Bind. € 34,05. (La vortaro aperis ankaŭ sur kompakta disko.)

Recenzon pri vortaro oni prefere verku nur post longaj monatoj, eĉ jaroj, da ĉiufanka uzado. Ĉi-kaze tiel estas: mi jam tri jarojn konsultadas ree kaj ree, ĝis malbindiĝo sed daŭre profitige, la verkon de Szerdahelyi kaj Koutny, kiu venis riĉigi la hungaran esperantistaron post jardekoj da preskaŭa senvortareco.

Nome, la malaktuala poŝvortaro de Pechan (1961), bona kaj ampleksa siaĝenre, povis kontentigi nur mez-progresintojn — ĝis antaŭ 10-20 jaroj. Nepris jam ke, kiel la lingvoj angla, ĉina, franca, germana, itala kaj portugala (ĉu iun mi forgesis?), ankaŭ la hungara havu sian grandan vortaron: jes, grandan, malgraŭ la insista modestaĵo de Koutny, kiu skribas ke ĝi “laŭ naciaj normoj estas nur meza vortaro”.

Pli ol meze imponas ankaŭ la amplekso de la kontribuintoj: krom la ĉefredaktoroj kaj la du kunredaktantoj (Ottó Haszpra kaj Balázs Wacha), listiĝas tri ĉefkunlaborantoj (dr. Miklós Fehér, Ervin Fenyvesi kaj Alfonz Pechan mem), kaj 41 pliaj kunlaborantoj,



Verko de du generacioj: Koutny finis la taskon de Szerdahelyi.

ĉiuj hungaroj. Ideale, por senpartia trakribro de hungaraj influoj, bonvenus alilingvana kunlaboro. En Hungario ja loĝas pli ol unu elstara e-isto nehungara: B. Golden, O. Kníchal, S. MacGill...

Laŭplane la verko aperus en la Jubilea Jaro, sed Szerdahelyi mortis en 1987. La ellaborado, komencita en 1983 kaj transirinta sub la zorgon de Ilona Koutny, daŭris fine tutan jardekon.

La dek jaroj fruktis ĉ. 65 000 leksikajn unuojn. Surprize grandan parton, pli ol trionon, konsistigas fakaj vortoj, en distribuo videble malegala laŭ fakoj, kion klarigas ke, laŭ Koutny “[en certa fazo] jam ne estis laŭcele rekomenci denove la laboron [por harmoniigi la proporciojn].” Nu, en ordo, sed kial fakvorto komunuzu kiel *cellux* tradukiĝas nur per *celukso*, ne per (*travidebla*) *glubendo*?

Iom grave (kaj paradokse ĉe tia fakvorta abundo), mankas multaj fremdvortoj, t.e. — jen difino malsama al tiu en PIV — vortoj jam hejmiĝintaj sed sentataj kiel fremdoriginaj, ekz. *animáció*, *diaszpóra*, *hamburger*, *lobby*, *spray*, *walkman*. Krom purismi, la verko ankaŭ prudas: ĝi ignoras ekz. la vulgaraĵojn *baszik*, *fasz*, *geci*, *picsa*, dum ial trasaviĝas *kurva*.

Domaĝe ke la vortaro ne indikas el kiuj aliaj vortaroj, esprimoj kaj similaj fontoj ĝi ĉerpis. Ekzemple, eblas nur konjekti ke la tre valora *La sporta lingvo en Esperanto* de Újlaky-Nagy estis prilaborita, dum pri *Domfabriko*

de Kalocsay-Csiszár ni supozus ke ĝi restis ekster konsidero.

La prezento de la kapvortoj estas klara, (sub)signifoj estas oportune dismontritaj, esprimoj kaj kuntekstaĵoj sufiĉe multas, la efektiva lingvouzo estas bone atentata... fakte, laŭdoj devus multe superi la ĵusan liston de kritiketoj. Eble ne estas troige pensi ke la vortaro povus utili ankaŭ al E-scipovantoj emaj deĉifri ion en la hungara.

Fine, anekdoto meditiva: Szerdahelyi (li estus 75-jara ĉi-aŭguste) kutimis diri ke li kun siaj verkoj estus baldaŭ komplete forgesita, se frustritaj vortar-uzantoj ne tenus longtempe viva lian memoron, ree kaj ree plendante ke tiu aŭ alia vorto mankas “en tiu fuŝa Szerdahelyi”...

Sed pravas nek forgeso nek frustriĝo.

István Erti - Nederlando

Por komencantoj

Tro da vortoj

Vivo kaj morto de Wiederboren.

12 humuraj kaj satiraj noveloj originale verkita en Esperanto. Auld, Conterno, Lorjak k.m.a. Jekaterinburg: Sezonoj, 1998. 80p. 20cm. € 4,80.

Ĉi tiu libreto enhavas dek du originalajn novelojn de diversaj verkistoj. Laŭ la eldonisto ĝi celas novajn esperantistojn. Sed pro la lingvonivelo de multaj rakontoj mi ne kredas ke ĝi speciale

taŭgus por komencintoj. Nur la du lastaj vere plaĉis al mi, *Tre moderna fabelo* de Szilágyi kaj *Spiona rondo* de Valano. Multajn aliajn novelojn mi trovis sufiĉe malinteresaj, eble parte ĉar ilia lingvo fojfoje estis tro komplika por mi. “Legu kaj lernu” — staras sur la novelaro, sed laŭ mi oni ne postulu ke novaj esperantistoj uzu sian vortaron tro ofte dum lern-legado!

Do, kara komencinto kiu serĉas bonan libron por plibonigi vian Esperanton, mi rekomendas unue legi *Vere aŭ fantazie* de Claude Piron kaj poste *Vivo kaj morto...*, kiam via vortprovizo estos pli granda.

Håkan Lundberg - Svedio

Laste aperis



Amikeca Reto 99-2000. Amboise: Amikeca Reto, 1999. 142p. 21cm. Kun mapoj. 571 adresoj en 50 landoj, kie esperantistoj povas trovi nekutiman gastigadon laŭ la fako, intereso, vizit-ebloj ktp. € 10,80.

Balado pri la luno kaj la cervo. En kvin lingvoj (1992). Ljubomir Trifončovski (1958). Esperanta, angla, finna, itala, sveda. El E-o trad. Sabira Ståhlberg, Krys Bottrill, Nicolino Rossi. Varna: Bambu, 1998. 52p. ISBN 954 9637 03 4. 20cm. Drameto. € 4,50.

Bildoj el la folkloro kaj tradicio argentina. Div. aŭtoroj. El la hispana trad. E. H. Garrote. Beauville: Laŭtel!, 1999. 68p. 21cm. Dek esoj atestantaj la pludaŭron de indianaj influoj en la argentina socio. € 3,90.

Cxu Esperanto post-vivos la jaron 2045? Tazio Carlevaro (1945). Bellinzona: Hans Du Bois, 1999. 51p. ISBN 88 87282 03 X. 30cm. Negativa analizo pri la pluviv-ŝancoj de nia lingvo en Svislando kaj aliloke. Iksoj anstataŭas ĉapelojn. € 6,00.

Ĉiuj kune. Aktoj de la 1-a Kunsido de la Strategia Forumo de la Esperanto-komunumo. Montpeliero, 3 aŭgusto 1998. R. Corsetti, Lee C.-Y., H. Tonkin, Y. Peyraut, A. Korĵenkov. Rotterdam: UEA, 1999. 20p. 21cm. Esperanto-Dokumento 35E. € 2,15. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Diccionario de bolsillo Esperanto-Español y Español-Esperanto. J. Paluzie-Borrell. Barcelona: Ramón Sopena, 1999 (reviziita el.). 383p. ISBN 84 303 0148 8. 14cm. Poŝvortaro kun 25 000 vortoj. € 6,00.

Esperanto. Van taalproject tot levende taal. Esperanto Nederland, 1999. 22p. ISBN 90 803 226 5 2. 21cm. Ilus. Nederlandlingva informbroŝuro precipe pri la historio de la lingvoproblemo, la artefaritaj lingvoj kaj E-o. € 2,10. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Esperanto: Dati e fatti. Red. F. Amerio, G. Bonvecchiato, G.C. Fighiera. Milano: FEI / Fondo Marelli, 1999. 93p. ISBN 88 85872 11 5. 21cm. Itallingva. Konciza manlibro pri Esperanto, la lingvo kaj la movado. € 6,90.

193. cm. Bind. La ĝis nun plej granda vortaro E-germana, celanta ampleksi la tutan komunuzan lingvon. Kun multaj fakvortoj kaj uzekzemploj. € 34,80.

Hermetikaj pumpiloj (por mediprotektado). Gilbert R. Ledon (1931). La aŭtoro, 1999. 32p. 23cm. Teknikaj Kajeroj 2. € 3,60.

Historietoj de la Siuoj (1934). Ĉefo Luther Standing Bear. El la angla trad. William R. Harmon. Berkeley: Bero, 1999. 59p. ISBN 1 882251 25 3. 22cm. Ilus. Herbert Morton Stoops. Rakontoj kiujn registris la indiana ĉefo Staranta Urso. € 6,00.

Ikaro ne sonĝis. Kial aviadiloj flugas. Gilbert R. Ledon (1931). La aŭtoro, 1999. 27p. 23cm. Teknikaj Kajeroj 5. Pri aviado, historie kaj mekanike. € 3,60.

Karmen kaj aliaj rakontoj. Prosper Mérimée (1803-70). El la franca trad. S. Meyer (1910) kaj P. Lobut (1963). Paris: UFE, 1999.

72p. 21cm. Karmen (1845), Mateo Falcone (1829) kaj La blua ĉambro (1866), rakontoj de franca korifeo de la romantismo. € 4,80.


Katalogo de esperantaj kaj interlingvistikaj libroj eldonitaj en Ruslando kaj Sovetunio. H. Gorecka, A. Korĵenkov. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999 (3-a eld.). 26p. 20cm. Pli ol 400 volumoj priskribitaj. € 3,30.

Liberigo / Eine Befreiung (1894). Karl May (1842-1912). El la germana trad. Cornelia Rau. Bamberg: Karl-May-Verlag, 1999. 237p. ISBN 3 7802 3005 4. 19cm. Dulingva eldono. Bind. La plej legata germana verkisto unuafoje en Esperanto. Aventuroj de la justulo Kara Ben Nems en fabela Oriento. € 18,60.

Lingvaj respondoj. Sergio Pokrovskij (1949). Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1999. 78p. 20cm. Dek esoj, aperintaj — reage al demandoj de legantoj — en la revuo Ruslanda Esperantisto. € 6,00.

Luccio e il pescecane, II. C'è un rimedio alla glottofagia dell' inglese? Andrea Chiti-Batelli. Bologna: Federalismo e Libertà, 1998. 25p. 25cm. Itallingva. Varianto de la eseo Por politiko de Esperanto (UEA, 1997). € 1,80.

 Daŭrigo sur p. 138



Por aĉeti ĉion el ĉi tiu "Laste aperis", vi bezonus monujon kun 292,50 eŭroj. Sed eĉ kelk-eŭra investo sufiĉos por havigi grandan spiritan profiton.

Esperanto: Leerboek van de internationale taal. De Zagreb Methode. R. Imbert, T. Sekelj, I. Špoljarec, S. Štimec, Z. Tišljär. Adaptis R. Haveman kaj M. v. Leeuwen-Burg. Maribor: Inter-Kulturo, 1999. 66p. 21cm. Nederlandlingva. € 4,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Fliĉts (1969). Ziraldo (1932). El la portugala trad. Kristoĉjo Resende (1988). São Paulo: Melhoramentos, 1999. 48p. ISBN 85 06 50412 0. 26cm. Bildlibro pri koloro kiu ne trovas sian lokon en la mondo. (Vd. recenzon sur p. 133.) € 8,40.

Granda teoremo de Fermat, La. Rajmondo Marty. La aŭtoro, 1996. 29p. 21cm. Pri fama matematikaĵo. Komprenebla por homoj kun mezlerneja klero. € 8,70.

Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Eich-Dieter Krause (1935). Hamburg: Helmut Buske Verlag, 1999. 14+882p. ISBN 3 87548

Laste reaparis

Al juna amiko. Grigorij Dolgin. Odeso/Moskvo: Viniti, 1996 (represo 1998). 159p. 21cm. Kun muziknotoj kaj ilustraĵoj de N. Kravcova. Porinfanaj poemoj kaj kantoj. Parte dulingva (rusa-Esperanta). € 4,80 Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Kaj plue...



FRANCIO: Lingvaj pledoj

En Caen, ĉe Le Mémorial (granda muzeo pri la dua mondmilito) pluraj centoj ĉeestis la 22-an de junio kunvenon pri la temo "Kiu(j) lingvo(j) por Eŭropo?", kie prezentis siajn vidpunktojn la fama franca lingvisto Claude Hagège kaj Brian Moon, tradukisto, Esperanta akademiano. Hagège pledis por plurlingva edukado ekde frua aĝo, dum Moon substreki la valoron de Esperanto por atingi la celojn de tia edukado, nome por krei konscion pri aliaj kulturoj kaj defendi la rajton je diverseco — depostulo kiun neniu publikano kontestis. (Y. Nicolas, Normanda Bulteno, B. Moon)

HISPANIO: Feste kaj foire

• En la 1-a Festo de la Lingvoj (Gijón, 11-13 marto) reprezenti-

ĝis la loka E-grupo, disdonante ĉe stando broŝuron de Hispana E-Federacio kaj propran flugfolio. En la programkajero de la festo aperis reklam-teksto pri E-o kaj la grupo. (S. Mulas y Gallego)



• Hispana E-Federacio unuafoje partoprenis la lingvofoiron Exolingua (22-25 apr., Madrido, 16 mil vizitantoj). Ĉi-okaze HEF eldonis informilon profesie dezajnititan, kun eltondebla kupono informpeta: disdoniĝis pli ol 1500. Ankaŭ la TTT-paĝaro de HEF, surloke konsultebla (<http://www.esperanto-es.org/>) estis aranĝita de profesiulo. Ĉefa logilo montriĝis "ludo-testo", ekzameneto gramatika, inter kies plenumintoj lotumiĝis koresponda E-kurso. Plurfoje la

testatoj ŝtopis la koridoron ĉe la stando. 304 redonitaj testfolioj servos por pligrandigi la datum-bankon de HEF. Dum la foiro 4 televido, 4 radioj kaj unu novaĵ-agentejo intervjuis akademianon

Ziraldo kun blankaj haroj, Kristoĉjo en blanka ĉemizo



BRAZIL: Flicts furoras

La 25-an de aprilo aŭtoro Ziraldo kaj tradukinto Kristoĉjo (vd. marto, p. 56) aŭtografis *Flicts* (vd. p. 135) en la San-Paŭla librofoiro, la tria plej granda de la mondo. La grava

ABRAHAM: Tutmonde unika vortaro kreas lokan sensacion

La eldono ĉe UEA, en la fora Roterdamo, de la 308-paĝa *Klara vortaro Esperanto-araba*, kiun la 83-jara Georgo Abraham kompilis per jardekoj da fervora laboro, ne povis ne interesi liajn samurbanojn en Venado Tuerto (Argentino). Gazetoj en la urbo kaj en la regiono (*El Alba*, *El Informe* k.a.) publikigis noticojn kaj intervjuojn kun Abraham; la loka televido raportis plurminute. La hejma telefono de la vortaristo sonoris

konstante pro gratuloj kaj informpetoj. Kulturaj institucioj invitis lin por prelegi. La loka muzeo aranĝis bankedon, en kiu Abraham (dekstre sur la bildo) transdonis al la urbestro de Venado Tuerto, d-ro Roberto Scott, la manuskripton de sia vortaro por la muzeo. (G. Abraham)

Ni planas en venonta numero de nia revuo intervjuo prezenti s-anon Abraham, aŭtoron de gramatikaj broŝuroj kaj precipe tradukinton de pluraj verkoj de G. Ĥalil Ĝibrano (i.a. Preter la horizonto, vd. p. 138).

Urbestro Roberto Scott (maldekstre) akceptas la manuskripton de *Klara vortaro* el la mano de Abraham.



Jorge Camacho. Farante salut-rondon, la urbestro de Madrido, Álvarez del Manzano, komentis ĉe la E-stando: "Nu, ĉi tio igos la ceterajn lingvojn nenecesaj". (A. Manero, *Boletín*)



Komplezo de R. Rezende

gazeto **A Tribuna** publikigis en sia infan-suplemento (4 jun.) 3 paĝojn pri E-o kaj *Flicts*: <http://www.geocities.com/EnchantedForest/6464/atribuna.html>. (R. Rezende)

KANADO: En ambaŭ lingvoj

Kanada E-Asocio (<http://www.esperanto.ca/kea>) jam longe planis publikigi informilojn en ambaŭ naciaj lingvoj de Kanado. Post la lanĉo de la anglalingva *Esperanto Update* antaŭ ses jaroj, KEA nun ekpublikigis en junio ankaŭ franclingvaĵon, *Aujourd'hui l'espéranto*.

NEDERLANDO: Komunikado por impresi

La landa asocio Esperanto Nederland dissendis la 29-an de majo gazetan komunikon pri la apero de la 446-paĝa gramatiko *Esperanto – Grammatica met oefeningen* (vd. jun., p. 119). En la komunikado la publikiĝo de tiu librego ĉe prestiĝa eldonejo impresas kiel la lasta ero en vico de eventoj, i.a. la starigo de interlingvistika katedro en Amsterdamo (vd. majo '98, p. 89) kaj elsendo de televida filmo pri Esperanto (vd. dec. '98, p. 213).



BELETRO: 4 verkoj de la jaro

38 abonantoj de *Literatura Foiro* voĉdonis pri la premio La Verko de la Jaro 1998, aljuĝenda al proza fikciaĵo originala ekvendita en 1997-98, proponita de almenaŭ tri membroj de Esperanta PEN-Centro. Po 8 voĉojn ricevis kaj kune proklamiĝis "verko de la jaro": *Durankulak* de Sabira Ståhlberg, *Pajleroj kaj stoploj* de William Auld, *Tien de Johán Valano kaj La tunelo* de Marco Picasso. Kromaj rezultoj: *Amparolo* de István Nemere 4, *Falantaj muroj* de Trevor Steele 2, *Tri rakontoj pri la Miljara Paco* de John Francis O. (Heroldo Komunikas - HeKo)

INTERLINGVISTIKO: Plinombriĝo en konferencoj

Same kiel pasintjare (vd. jul.-aŭg., p. 141), la Hungaria Konferenco pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko (8-10 apr., Veszprém) havis interlingvistikan sektion, kiun estris Ilona Koutny. Prelegis Michael Farris, Francesco Felici, Ilona Koutny, Katalin Smidélus, Blazio Vaha kaj Zsuzsa Varga-Haszonits. En la enkonduka diskuto "Mondlingvo kaj regionaj lingvoj" György Szépe, prezidanto de la landa lingvista asocio, parolis pri Esperanto kaj la angla kiel la nuraj realaj mondlingvo-kandidatoj. En la venontaj konferencoj la e-istaj partoprenantoj prefere aliĝu al diversaj sekcioj, por ke temoj E-riktaj estu pli vaste diskutataj. Tion volonte kunordigos Katalin Smidélus (✉smidik@rik.bdtf.hu).

RADIO: Esperanta skribemo

El la 7772 leteroj kiujn Radio Aŭstria Internacia ricevis pasintjare, 3503 (45,1%) estis en Esperanto, 2708 (34,8%) en la angla, 844 (10,9%) en la franca, 717

SCIENCO: AIS tutmondas

• Filio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) estis registrita la 2-an de feb. en Meksiko. La prezidanto-fondinto, psikologo Rubén Feldman González (✉+52/65/565-886; ✉103163.3356@compuserve.com) de marto ĝis majo vizitis universitatojn por fundamenti la estraron de la filio, kiu kongresos venontjare (Celaya, 21-23 apr.). (R. Feldman González)

• En la 23-a Internacia Junulara Festivalo (Rimini, Italio, 31 marto - 6 apr.), Carlo Minnaja gvidis AIS-kurson pri E-literaturo, Renato Corsetti pri lingvoakirado kaj Reinhard Fössmeier pri kom-

putil-reta sekureco. Pli ol 20 studentoj akiris AIS-ateston, du partoprenis ekzamenon. (G. Castelli, Ret-Info)

• Bydgoszcz (Pollando) gastigis la 20-an Sanmarinecan Universitatan Studsesion de AIS (1-9 majo). 150 studentoj kaj profesoroj el 15 landoj uzis E-on kiel laborlingvon. La prelegoj kovris vastan temogamon ekde logiko, eŭrologio kaj "lingvo-orientiga instruado" ĝis "Manĝado: herboj en internacia turismo" kaj "Transnacieco en scienco". Oni omaĝis al la memoro de la AIS-senatano prof. Tyburcusz Tyblewski (vd. feb., p. 40). (A. Casquero)

KOMPUTO: Serĉi hejme eksterteranojn

La 17-an de majo startis por la granda publiko la programo SETI@home. Kadre de SETI ("Serĉado de Ekster-Tera Inteligentulo"), nun ĉiu ajn povas partopreni, per sia hejma komputilo, en analizado de elspacaj radio-ondoj. Konsultu Esperante la paĝon (zorge de Gorou Humihiko) http://plaza22.mbn.or.jp/~gthmhk/seti/home_esperanto.html.



(9,2%) en la hispana kaj neniuj en la araba. (W. Klag, L. Patek)

Similan procentaĵon por Esperanto ni trovas ĉe Pola Radio en la unua kvarono de 1999: venis 496 leteroj (40%) al la E-redakcio, dum la ciferoj ĉe la aliaj redakcioj jenas: germana 249 (20,1%), belorusa 170 (13,7%), angla 116 (9,4%), la kvin aliaj kune 210 (16,9%). La proporcio de Esperantaj leteroj ja malpliĝis kompare kun la tuta jaro

1998 (50,4%), sed tio okazis post limigo de la elsendo-tempo kaj forigo de la satelitaj elsendoj vesperaj. (A. Pettyn)

TRADUKADO: Baghy norvege

Odd Tangerud finis norvegan tradukon de la romano *Viktimoj* (1925) de Julio Baghy kaj ankaŭ aranĝis ĝin kiel teatraĵon. Li nun serĉas eldononton por la libro kaj teatron por surscenigo. (Norvega Esperantisto)



Festu Tinĉjon 70-jaran!

De kiam la detektiveto debutis en 1929, vendiĝis milionoj da Tinĉjo-bildstrioj en pli ol 32 lingvoj. La du Esperantajn titolojn oni jam kredis elĉerpitaj, sed nia Libroservo akiris stokon de La nigra insulo; ĝi estas nun ties ĉefa distribuanto.

La nigra insulo. Hergé. Trad. Jopetro Danvy. Paris: Esperantix, 1987. 62p. 30cm. € 10,00.



BULGARIO: Brila EKRA '99

Ĉiujunie la E-Domo de Kulturo en Razgrad (prezidita de la ĵus forpasinta Ivan Kirĉev; vd. jun., p. 120) aranĝas E-istan Krean Renkontiĝon Abritus (EKRA): ĉi-jare koincide kun la 5-a Danuba E-Rendevuo (4-6 junio). Apud riĉa arta programo — i.a. unuafoja prezento de E-propaganda filmo de J.-L. Mahé, *Antaŭen* (1938), kaj lanĉo de la poemaro *Sonoj kaj kredoj de Razgrad* — prelegis redaktoroj Aleksander Korĵenkov, Perla Martinelli (*Heroldo*) kaj Sabira Ståhlberg (*Kontakto*). Akceptis ilin la urbestro, malavara subteninto de Zamenhof-reliefo sur la E-Domo, inaŭgurita dum la aranĝo. La

literaturan EKRA-konkurson gajnis Marie-France Condé-Rey, Lilia Nikolova (poezio) kaj Ivaniĉka Maĝarova (humuro). (S. Ståhlberg)

ITALIO: Torinaj ekzamenoj

Inter januaro 1995 kaj aprilo 1999 okazis 359 kursofinaj ekzamenoj pri la fako "interlingvistiko kaj esperantologio" ĉe la beletra fakultato de la Torina Universitato, sub prof. Fabrizio Pennacchietti. Por komparo: en la sama periodo 243 studentoj ekzameniĝis pri la rusa, 60 pri semida filologio, aŭ 37 pri la hungara. (*L'Esperanto*)

KANADO: Urba reto

La urbo Montrealo kreis en 1996 reton de volontulaj tradukistoj, kiuj helpas anojn de la 175-lingva urbanaro interrilati kun la administracio. Esperanto estas unu el la 22 lingvoj kiujn la reto ĝis nun traktas: Normand Fleury jam du fojojn estis petita traduki leteron ricevitan ĉe la urbestra

oficejo. (*La Riverego*)

KROATIO: Nova ejo Zagreba

Preparante sin al la UK en 2001, la Zagrebaj e-istoj disponas pri nova ejo urbocentre (str. Kneza Mislavova 11). Urbeŝtrino Marina Matulović-Dropulić letere dankis



LKK-anino Ankica Jagnjić dum la unua vizito al la nova Zagreba Esperantejo

ke UEA elektis kongresi en la nova jarmilo unuafoje en Zagrebo. La e-istoj nun atendas informon pri la lupago kaj antaŭvidas monatojn da konstrulaboroj en la nova

ejo. Dume plu validas la kutima adreso (Amruŝeva 5/1). (S. Ŝtimec)

TAJvano: Revigliĝo

La Esperantan vekigon de 1990-92, post instru-vizitoj de Joachim Werdin, sekvis plurjara movada silento en la insulo Tajvano. Nun tamen reaŭdiĝas voĉo tajvana, de ZHONG Qiyao (Daxue Lu 90-10-3, TW-300-56 Xinzhu; □zhong@accton.com.tw), redaktoro de la trimonata bulteno de Tajvana E-Asocio, *Tajvana Esperantisto*: "Ni decidis revigligi la asocion" — anoncas la bulteno. Unua paŝo al tio estis restoracia kunveno de 8 e-istoj la 29-an de majo.

USONO: Telefonaj seminarioj

E-Ligo de Norda Ameriko jam la duan jaron regule aranĝas telefonajn seminariojn, kiujn motoras Kent Jones el Chicago: konektiĝas 5-10 homoj por almenaŭ duonhoro, por trakti temon movadan aŭ nemovadan. Registraĵo estas poste aĉetebla. (B. Kolker)

Laste aperis

Neĝulino kaj aliaj fabeloj (1812-15). Fratoj Grimm (Jacob, 1785-1863; Wilhelm 1786-1859). El la germana trad. (1906) Kabe (K. Bein). Paris: SAT, 1999. 94p. 21cm. Ilus. 14 fabeloj, en senŝanĝa represo el 1939. € 4,80.

Opasnyj jazyk. Kniga o presledovaniĵah esperanto (1988). Ulrich Lins (1943). El Esperanto trad. Viktor Aroloviĉ, Lev Vulfoviĉ, Ludmila Novikova. Moskva: Prava ĉeloveka / Impeto, 1999. 574p. ISBN 5 7161 0055 4. 20cm. *La danĝera lingvo* ruslingve. Detale dokumentita historio de la atakoj kontraŭ kaj la subpremo de la E-movado. € 9,00.

Paĝoj bizaraj. Urmuz (ps. de Demetru Dem. Demetrescu-Buzău, 1883-1923). El la rumana trad. Ionel Oneț. Berkeley: Bero, 1998. 44p. ISBN 1 882251 16 4. 22cm. Prozaĵetoj de groteska majstro, anoncanto de dadaismo. € 6,60.

Preter la horizonto. Gibran Khalil Gibran (1883-1931). El la araba trad. Georgo Abraham. Chapeco: Fonto, 1992. 96p. 21cm. Noveloj kaj pensoj de la mondfama aŭtoro de *La profeto*. € 6,60.

Raportoj el Japanio 2. Septembro 1997 - Decembro 1998. HORI Yasuo (1941). Tokio: Libroteko, 1999. 84p. ISBN 4 947728 20 3. 21cm. Kun fotoj. Mallongaj raportoj pri diversaj aspektoj de la japana vivo. € 9,00.

7 elektitaj noveloj de nord- k sud-vjetnamaj geverkistoj. Redaktis kaj el la vjetnama trad. Nguyen Minh Kinh. Hanojo:

Monda Eldonejo, 1999. 176p. 19cm. Prozaĵoj el la lasta jardeko. € 3,00.

Spektro de l' tempo. Elektita poezio kaj muziko. Grigorij Dolgin. Red. V. Melnikov. Odeso/Moskvo: Impeto, 1993. 158p. 20cm. Dulingva: Esperanta/rusa, kun muziknotoj. € 4,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Spite la vivon! Mezgajaj poemoj originalaj kaj parodiaj (1928). Miŝu Beraru (1904-38). Berkeley: Bero, 1998 (2-a, korektita eld.). 107p. ISBN 1 882251 22 9. 21cm. Rumana poeto antologio, sed ne sufiĉe konata. € 9,00.

Subtekste. Paroligaj kaj perfektigaj ekzercoj. Paul Gubbins (1949). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1998. 72p. ISBN 90 71205 78 9. 30cm. En plasta protektilo. 70 tekstoj el *Monato*, gradigitaj laŭ simpleco. € 12,00.

Trans maro kaj morto. Krimromano. Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1999. 80p. ISBN 91 973467 4 8. 21cm. Krimoj en sveda medio, "sed kun internaciaj ligoj kaj perspektivo". € 6,30.

Virusoj. Kvar teatraĵetoj. Gilbert R. Ledon (1931). La aŭtoro, 1999. 64p. 21cm. Pri "grandaj virusoj kiuj plagas nian socion". € 3,90.

KASEDO

EOla-kompilaĵo. M. Bronŝtejn, S. Bozin, J. Amzeev, V. Ŝiŝkin k. a. Moskvo: Continental Studios, 1998. 88 min. 31 kantoj registritaj dum la ruslanda aranĝo EOLA ("Esperanto — Lingvo Arta"), 1998. € 13,20.

KOMPAKTA DISKO

Por la mondo. Merlin Esperante. M. Froes, A. Gandra, S. Ribeiro, S. Vieira, G. de Souza Lima. Donneville: Vinilkosmo, 1999. 30 min. Kolekto 2000. Profesia brazila bando ludas 9 kantojn diversastile, de pop-roko ĝis sambo. € 15,00.

LUDO

Glosoblogo. *Ludo per lingvo.* Skövde: Al-fab-et-o, 1999. 288 kartoj kun 1440 vortoj. Amuza lingva ludo, en kiu oni elpensas klarigojn kaj divenas signifojn. € 12,60.

VIDBENDO

Tra la tanzania lando per sia esperantistaro. Francisko Randin (1951). Lausanne: Nandir Filmoj, 1999. 40 min. PAL, NTSC. Raporto pri dektaga vojaĝo. € 29,95.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!



SLOVAKIO: Revua relanĉo

Post unujara paŭzo reaperas *Esperantisto Slovaka*, nun kiel "sokikultura kaj informa gazeto de Slovaka Esperanta Federacio". Redaktas ĝin Lucia Fedorová (P.O. B. B-152, SK-012 41 Žilina; redakcio@esperantisto.sk).

KARTVELIO: Monata revuo

Kaŭkazo nomiĝas monata (!) revuo de Kartvelia Esperanto-Asocio (KarEsA, str. G. Ĉanturia 12, ĉambro 908 [por s-ro D. Ĉitanava], GE-380008 Tbilisi). Ĝis nun atingis nin la n-roj 98/5 kaj 6 (po 16 densaj paĝoj), en kiuj estas legeblaj i.a. "Fundamentaj informoj pri la historio de Abĥazio" sur 6 paĝoj.



KELKLINIE

- Franca Katolika Esperantisto, trimonata bulteno de Franca Katolika E-Asocio, aperis en marto la 200-an fojon.
- Kontribue al Kampanjo 2000, la revuo *Rio Esperantista* (Brazilo) regule publikigas informojn

el la bulteno *UN en Foco* ("UN en fokuso").

- Delegito en Taegu (Koreio), infankuracisto d-ro Kim Yung-myung eldonis libron en la korea, "Voĉo de tagiĝo" (312p), kun infan- edukaj konsiloj, en kiuj li informas ankaŭ pri Esperanto.

MATTHIAS: La nova latino

Fine de julio ĉe la eldonejo Armin Gmeiner (Messkirch) aperos, en rimarkindaj 10 mil ekzempleroj, 123-paĝa germanlingva libro de Ulrich Matthias: *Esperanto — das neue Latein der Kirche*. ("Esperanto — la nova latino de la eklezio"), subtitole "La internacia lingvo serve al kompreniĝo inter kristanoj evangeliakaj kaj katolikaj". La iniciatinto de la projekto, pastro Bernhard Eichkorn, jam kolektis milojn da mendoj. La libron akompanos granda informkampanjo. (U. Matthias).

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

TUTMONDE ni deziras korespondi: Centre Culturel Espéranto, 10 A, rue des Courtils, FR-25000 Besançon, Francio.

GEKNABOJ 8-11-JARAJ korespondus kun samaĝa grupo ajnlanda. La gvidanto skribu al Thierry Saladin, Réinsertion et Espéranto, Rs. La Vigne de la Vierge, Bât. 6 147, Ave. Paul Bringuier FR-34080 Montpellier, Francio, aŭ Sociala.Integriĝo.kaj.Esperanto@wanadoo.fr.

RETADRESO HAVAS nun Aleksandr Fiŝkin, junulara delegito en Sankt-Peterburgo, Rusio: fishkin@chat.ru.

KARTVELIA SEKCIO de Mondpaca E-Movado kunlaborus kun MEM-sekcioj tutmonde: Kartvelio, GE-380075 Tbilisi, str. Kostava 77, Teknika Univ., ESPERANTO MEM-sekcio, Manana Cuckiridze.

IMPOSTIGI FINANCAJN PROFITOJN kaj bremsi la teruran povon de la financa sfero celas asocio ATTAC. Kontakto: Anne Ambles, 6 rue Grimaux, FR-17300 Rochefort, Francio; [+33/546-88-73-97](tel:+33546887397); anne.ambles@wanadoo.fr.

BV. SENDI BONDEZIROJN al Klubo de Kristanaj Infanoj: Salvation Army, Walker Road, Cardiff CF2 2EG, Kimrujo.

REPREZENTANTOJ DE KEATUR, turisma fako de Kuba E-Asocio, plezure atendas eksterlandajn esperantistojn en ĉiuj provincoj de Kubo. Adreso: Vista Alegre 264 e/ Juan B. Zayas y Luz Caballero, Vibora, La Habana, Kubo; [+53/537-404-484](tel:+53537404484), 401-364; [338-729](tel:+53338729); kubesp@mail.infocom.etecsa.cu, <http://www.infocom.etecsa.cu/new/esperanto/index.html>.




NOVA TELEVID-SERIA KURSO

VERKITA DE PAUL GUBBINS
KUN JUNAJ TALENTAJ
ESPERANTISTOJ EN LA ROLOJ

POR INSTRUI
ESPERANTON

Esperanto — pasporto al la tuta mondo konsistas el 15 lecionoj (po 30 minutoj) kaj akompana presita materialo, celantaj individuon aŭ grupan studadon. La distra historio konstruita sur didaktika bazo faciligas kaj ĝojigas la lernadon. Ĉiu leciono okazas plene en Esperanto.

La kontinueco de la aventuroj de familio Bonvolo, la televidseria karaktero, kaj la vigla kaj sprita dialogo katenas la atenton.



La resumo detale traktas la ĉefajn gramatikajn erojn prezentitajn en ĉiu ĉapitro. Skrib-ekzercoj, verkitaj de Stefan MacGill, kompletigas la lecionojn.

La unuaj kvar lecionoj jam aperis kaj estas vaste laŭdataj. Prezo: € 78,95. La sekvaj ses lecionoj estis filmitaj somere de 1998. Antaŭmenda prezo: € 100. Antaŭmenda prezo por la tuta kompleto de 15 lecionoj: € 240.

Ĝuu kaj ĝuigu Esperanton kun la familio Bonvolo!

Tom ELLIOTT (1926-1999), unu el la plej elstaraj kaj laboremaj esperantistoj aŭstraliaj, forpasis la 18-an de junio en Matraville. Lerninte mem E-on en 1960, li tuj prenis sur sin taskon tutvive plenumotan: estri la tutlandan libroservon. Krome li longtempe servis kiel sekretario (1966-69) kaj plurmandata prezidanto de Sidneja E-Societo, administranto de la landa E-revuo kaj kotizperanto de UEA. Radio-elektronikisto kaj fakulo pri komputilaj trafikkontrol-sistemoj, li uzis siajn lertojn ankaŭ por la publikigo de multaj aŭstraliaj E-eldonaĵoj.

“Unu el la plej trezorigaj ĝuoj en mia E-vivo estis amikiĝi kun Tom Elliott” — kondolence mesaĝis Kep Enderby.

Nano KJUČUKOV (1919-99) forpasis lastatempe en Sofio. Liservis kiel estraro (1964-74) kaj vicprezidanto de Bulgara E-Asocio (1975-88), kaj LKK-vicestro de du



Arkivo de UEA

Universalaj Kongresoj (Sofio, 1963 kaj Varna, 1978).

Avetis PATATJAN (1952-1999) prezidanto de Armena E-Asocio ekde ties fondo en 1990, delegito pri turismo, mortis la 12-an de majo en Jerevano.

Johanna C. VAN TINTEREN (1903-1999) forpasis la 26-an de junio en Amersfoort (Nederlando). Dumviva membro, ŝi tre aktivis eĉ alt-aĝe, i.a. kiel regula kongresano kaj loka delegito dum tri jardekoj.

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Italio: Teresa Casagrande. Usono: Takaki J. Hashimoto.

PATRONOJ DE TEJO 1999

Belgio: Antoine J. Mechelynck. Francio: Jacques Decobert; Pierre Levy; Hervé Mougin; Roger Despiney. Kanado: Brian D. Kaneen; Stevens T. Norvell Jr. Norvegio: Margrete Landmark.

SOCIETO ZAMENHOF 1999

Brazilo: Álvaro Rabêlo. Britio: E. R. Waterworth. Danio: Emil Vaarst. Francio: Clara Troper; Roger Despiney. Germanio: Doris Freess; Helga Erhard. Hispanio: Laurentina Parada de Palacios. Italio: Maria T. Malatesta. Kanado: Bruce R. Crisp; Stevens T. Norvell Jr. Korea Resp.: D-ro PARK Hwa-chong. Nederlando: M. v. Bentum-v.d. Broek; Ru H. Bos-song. Norvegio: Margrete Landmark; Olav Bjørnsrud.

DONACOJ 1999 (EUR)

ĝis la 30-a de junio

Fondaĵo Afriko: Hispanio: J. Raposo Montero 10,00. Nederlando: Konversacia Grupo Nijmegen 94,84; G. F. Makink 226,89. Svedio: J. Hammarberg 44,52. Sumo ĉi-jara: 380,92.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: S. S. Ledon 92,19. Finnlando: T. Sormunen 50,00. Svedio: J. Hammarberg 33,39. Usono: Alice L. Harris 1 850,14. Venezuelo: Venezuela E-Asocio 13,20. Sumo ĉi-jara: 2 063,17.

Fondaĵo Azio: Hispanio: J. Raposo Montero 10,00. Japanio: Y. Aida 15,32; E-Ligo de Sikoku 15,32; N. Hatayama 15,32; H. Horiuti 3,81; K. Huzimaki 15,32; T. Imazu 30,49; T. Itabasi 15,32; K. Kai 30,64; R. Karibe 15,24; S. Koga 15,24; K. Kosaka 15,32; T. Koyama 15,24; H. Miedema 15,24; Mijazaki E-Societo 15,24; S. Mitukawa 15,24; T. Nisio 30,49; Y. Oosaki 15,32; Y. Oozato 15,24; T. Saitou 15,24; E. Satou 15,32; S. Satou 30,64; A. M. Steffes 15,32; T. Suzuki 15,24; H. Takahasi 45,96; M. Tamura 14,48; K. Tutiya 15,32; S. Yamamoto 30,64. Nederlando: F. D. v. Zoest 11,34. Sumo ĉi-jara: 1 438,27.

Fondaĵo Canuto: Argentino: R. G. Calógero 117,00. Belgio: G. Mallet 11,34. Germanio: G. Macioszek 153,39. Hispanio: J. Raposo Montero 10,00. Francio: H. Mougin 6,10. Nederlando: Konversacia Grupo Nijmegen 90,75; F. D. v. Zoest 22,68; F. Zeiler 47,65; F. H. Kat 22,69. Nov-Zelando: Nov-Zelanda E-Asocio 158,35. Sumo ĉi-jara: 3 639,65.

Konto Espero: Aŭstralio: J. R. Bishop 100,00. Francio: Esperanta Kultura Centro 701,27. Germanio: Germana E-Asocio 76,69. Italio: Partoprenantoj 23-a IJF 103,29. Nederlando: G. A. M.

v. Bergeijk 75,00. Sumo ĉi-jara: 1 869,78.

Junulara Fondaĵo: Hispanio: J. Raposo Montero 10,00. Nederlando: F. H. Kat 22,69. Usono: Alice L. Harris 925,07. Sumo ĉi-jara: 1 051,98.

Fondaĵo Ofic. Ilaro: Nederlando: F. D. v. Zoest 11,34. Usono: Alice L. Harris 925,07. Sumo ĉi-jara: 936,41.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstralio: R. Harry 62,00; C. Holliss 62,00; J. R. Bishop 50,00. Finnlando: I. Heikkilä 13,00. Francio: M. Sujet 50,00. Hispanio: J. Raposo Montero 10,00. Nederlando: R. Moerbeek 20,00; F. van Mook 4,54. Sumo ĉi-jara: 528,33.

Volontula Fondaĵo: Japanio: A. M. Steffes 95,29. Nederlando: R. Moerbeek 15,00; F. van Mook 4,54. Usono: Alice L. Harris 925,07; R. Salcedo 6,81. Sumo ĉi-jara: 2 717,42.

Kampanjo 2000: anonime 150,00. Nederlando: F. H. Kat 22,69; F.D.v.Zoest / GEJA Esp. Fond. 11,34. Sumo ĉi-jara: 388,23.

Ĝenerala Kaso: Germanio: B. Gotschy 4,09; U. Richter 3,58; H.J. Schaefer 6,65; K. Stahl 3,57; E. Walter-Schwieen 2,55. Kanado: P. Ronald 12,11; D. Hackett 15,13. Nederlando: F.D.v. Zoest / GEJA Esp. Fond. 34,02. Svislando: E. Lutz 31,11. Usono: T. J. Hashimoto 9,44. Sumo ĉi-jara: 3 543,15.

Renovigo de la Domo: Nederlando: F. D. v. Zoest 11,34. Sumo ĉi-jara: 11,34.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Estraro de UEA

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎+61-2-9810-4227; ✉+61-2-9555-9705; ✉kependery@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎+39-06-957-57-13; ✉+39-06-957-66-33; ✉corsetti@iteldad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-06-39-72-61-98; ✉+39-06-39-72-61-69; ✉lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice,

Ĉeĥio; ☎+420-2-991-2201; ✉+420-2-991-2126; ✉chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎+228-27-21-17.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎+46-70-636-93-78; ✉Kalle.Kniivila@sydsvenskan.se.



LA RADIKOJ DE EVOLUO

Mervyn Claxton

Kulturo kaj evoluo



UEA


La kulturo de ĉiu popolo estas intime ligita al ĝia evoluo. Lastatempe tiu ligo rompiĝis, precipite en evolulandoj, pro adopto de la okcidenta evolumodelo kaj internaciigo de la okcidenta evolumodelo. La aŭtoro de tiu ĉi Unesko-studo – klerulo kaj eksdiplomato el Trinidado kaj Tobago – tamen montras kiel ankaŭ nun eblas utiligi la tradiciojn de la popolo por ĝia evoluo.

“Evoluo povas prosperi nur se ĝi havas radikojn en la kulturo kaj tradicio de la koncerna lando.” (p. 15)

KULTURO KAJ EVOLUO. Mervyn Claxton. El la angla trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1998. 60p. ISBN 92 9017 059 X. 21cm. Prezo: € 6,80.

WINNIE-LA-PU

...en Esperanto!



Traduko de Ivy Kellerman Reed kaj Ralph A. Lewin kun enkonduko kaj vortolisto por anglalingvanoj. Ilustraĵoj de Ernest H. Shepard.

Eldonis UEA: 1992. Tole bindita kun kromkovrilo. Prezo: € 12,25. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

ŜLOSILO AL 76 LANDOJ



Probable la plej populara eldonaĵo de TEJO, la listo de esperantistaj gastigantoj **Pasporta Servo** aperadas ekde 1974. La freŝa, 174-paĝa kajero **Pasporta Servo 1999** enhavas 945 adresojn – 74 pli ol pasintjare – en 76 landoj.

Gastigantoj ricevas senpage la liston. Aliaj povas ĝin mendi je €10,90 (kun triona rabato por minimume tri ekz.). Por aliĝi kiel gastiganto, petu aliĝilon de UEA aŭ de la landaj organizantoj. La sekva aliĝo limdato estas la 1-a de nov. 1999. Jamaj gastigantoj ricevos memorigilon en aŭgusto. Pliaj informoj ĉe la kompilanto: Derk Ederveen, Westenburgstraat 15, NL-2275 XR Voorburg, Nederlando; ✉ pasporta.servo@esperanto.nu, <http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>.

Reaperis Paŝoj al plena posedo de Auld



La plej fama progresiga lerno-libro de Esperanto, per kiu ĉ. 20 000 esperantistoj perfektigis jam sian scion ekde 1968. Ĉi tiun 7-an eldonon prizorgis Edistudio (C.P. 213, IT-56100 Pisa, Italio; ✓ +39/50/48-670; ☎ /500-585; ✉ edistudio@sirius.pisa.it).

Mendebila ĉe la eldonejo, UEA aŭ ĉe naciaj libroservoj. Vendo-prezo: 12 eŭroj.

GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesko pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj.

La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la hom-rajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.




HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ. Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: € 10,90.

DRILLING BILLY

KOMPUTILA LUDO
KUN PLI OL
150 LUDNIVELOJ

EN ESPERANTO KAJ 12 ALIAJ
LINGVOJ. € 24,50. TRIONA
RABATO EKDE 3 EKZEMPLEROJ.
HEJMPAĜO: WWW.ESPERANTO.DK/BILLY/





En 1998 224 esperantistoj subtenis la agadon de UEA por aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en 1998 estis bela SZ-kalkulilo. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



Salutu la jaron 2000 en Kubo

Internacia Komunista E-ista Kolektivo invitas al partopreno en ĝia **12-a konferenco**, de 22 decembro 1999 ĝis 4 januaro 2000 en **Havano, Kubo**. La programo antaŭvidas konatiĝi kun la nuna situacio de Kubo, la Kuba kulturo, alternativa medicino, la flaŭro, sed ankaŭ diskutojn pri paŝoj al alternativa socio, ekskursojn interesajn, kursojn pri Kubaj ritmiloj, dancoj, hispana lingvo, E-o; infanprogramojn. Kaj ĉio enkadre de bela kongresejo, de Kuba muziko kaj dancado (ekz. kun ĉarmaj Kubaj gesamkongresanoj). Kaj ĉio **adaptita al modesta monujo**. Ne necesas esti IKEK-ano, sufiĉas sciem pri Kubo kaj aspiri al homdigna socio. Por detaloj bv. kontakti: **Vincento CHARLOT**, 10 Square Savorgnan de Brazza FR-94310 Orly, Francio, esperant@worldnet.fr.

Unika fojo en Hanojo




Dua Azia kongreso de E-o, 22-25 aŭg.

Kongreskotizo: 160 USD por A-landoj; 100 USD por B-landoj. Senpage por infanoj ĝis 13 j. kaj akompanantoj de handikapuloj. **Loĝado:** 5* Hotelo Horison (la kongresejo): 65USD; 4* kaj 3* Hotelo Hanoi 27-47 USD; Hotelo Kim Lien 7 USD (dulita ĉambro). **Tage tri manĝoj:** 20 USD (Horison), 15 USD (Hanoi), 10 USD (Kimlien). **Ekskursoj** duontagaj ĉiutage, en kaj ekster la urbo. **Antaŭ- kaj postkongresoj**, vesperaj kulturaj kaj amuzaj programoj antaŭvidataj. **Limdato por mendoj:** 20 junio. **Fakaj asocioj** kiuj planas organizi kunsidon dum la kongreso, kontaktiĝu kun Puramo CHONG (puramo@chollan.net). **Loka organizanto:** Vjetnama E-Asocio, 105A Quan Thinh Str., Hà Nội; ☎+84/4/823-20-12; ☎/733-02-01. Informas ankaŭ Komisiono pri Azia E-Movado (kaem@egroups.com) kaj Japana E-Instituto (jei@mre.biglobe.ne.jp). **Aliĝilo** petebla de la CO de UEA.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KŬIARTO estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KŬIARTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1999 **KŬIARTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1999

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	40 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2400 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	31 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	33000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

Eltranĉu el via Jarlibro la lastan paĝon



**10%
RABATO!**

kaj sendu ĝin al la Libroservo de UEA! Ĝi ja estas kupono, kiu rajtigas vin ĝis la 31-a de dec. 1999 mendi kion ajn kaj kiom ajn kun 10%-a rabato!

POR LERNI KAJ ARGUMENTI

Ĉu la lingvopolitiko de internaciaj organizaĵoj utilas nur por simbolaj politikaj celoj? Ĉu aktualaj modeloj de plurlingva demokratio efektive diskriminacias? Kian rolon ludu lokaj lingvoj en la solvado de mondaj problemoj? Kion eblas lerni el la spertoj pri Esperanto? Ĉiu kontribuado en la originala lingvo (angla, franca aŭ Esperanto), kun resumo en ĉiuj tri lingvoj. La angla teksto de la pionira raporto "Esperanto kaj la lingva demando ĉe Ligo de Nacioj" de NITÖBE Inazō estas unuafoje publikigita ĉi-libre.



AL LINGVA DEMOKRATIO / TOWARDS LINGUISTIC DEMOCRACY / VERS LA DÉMOCRATIE LINGUISTIQUE. Aktoj de la Nitobe-Simpozio, Prago, 1996. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc (red.). Rotterdam: UEA, 1998. 212p. ISBN 92 9017 054 9. 24cm. Prezo: €10,20.